

中國報道

EL POPOLA

CINIO









INTER NI

Pri videobendo "Ĉina Masaĝo" mi eslore traktis la problemon. Post eksperimento lastdimanĉe mi povas aserti, ke vi povas publikigi tiun informon ke la uzantoj de la sistemo SECAM povas tre bone vidi kaj aŭdi la videobendon PAL pere de magnetoskopo- kaj televidoaparatoj nur de la sistemo SECAM; sed ili vidos la bildon nur nigrablankan.

ROBERT MARAIS (Francio)

La videobendo "Ĉina Masaĝo" (Esperanta versio) farita de la redakcio de EPC estas jam distribuata. Nia franca leganto Robert Marais iam maltrankvilis pri tio, ĉu lia televidoaparato (SECAM) povas helpi lin rigardi nian videobendon (PAL). Li jam forigis sian maltrankvilon per sia eksperimentado. Ni esperas, ke niaj aliaj legantoj ankaŭ sukcesos en provado.

La Red.

De nun la rubriko "Amuzoj" ĉiujare okazigos unu aŭ du konkursetojn. La konkursa rezulto estos publikigita en la sama rubriko. La listo de adreso kaj porresponda tabelo por ĉifoja konkurso estas kunmetita kun la enketilo en tiu ĉi numero.

La Red.

Floroj sur maljuna arbo

Foto de **LIU SIGONG**

ENHAVO

18 Ĉina ekonomio en reguligo

10 VOJAĜO EN LA DELTO DE PERLO-RIVERO (3)

Nova koncepto de la ĉinaj kamparanoj

6 FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO

Sincera helpo al la kripluloj

21 Vizito en Qinghua-universitato

52 SCENEJO KAJ EKRANO

“Damo Papilio” de Taiwan en Pekino

32 LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (13)

Ŝtonpordoj sur la vojo Wuchidao

30 Specifa terapio kontraŭ vaskularito

15 Esplorvojaĝo tra Azio — konkludoj, planoj...

16 MI KAJ ĈINIO

Post legado de “EPĈ”

Mi kaj EPĈ

45 Ni dankas la kontribuintojn por

“Mi kaj Ĉinio”

26 Kubo, gastiganto de la 75-a UK

40 POR KOMENCANTOJ

20 ESP-NOVAĴOJ

4 INTER NI

41 Brilas antikva mono

27 POEMO • PENTRAĴO • KALIGRAFAĴO

Pri *Rememoro pri la Sudo*

42 Giganta okulo por observi la kosmon

37 ĈINA LITERATURO

La tria ĉapitro el la romano

“Songô en la Ruĝa Buduaro”

44 AMUZOJ

50 Amatoro de miniaturaj envazaj pejzaĝoj

46 Kirgizoj

48 KURANTAJ AFEROJ

16 KORESPONDI DEZIRAS

2 La Budho-sunuma Festo

Foto de YANG DAZHOU

4 Floroj sur maljuna arbo

SUR LA KOVRILO

En somero

Foto de ZHANG GUOWEI

SUR LA DORSKOVRILO


Smolando de Svedio en vintro kaj

somero

de MALTE MARKHEDEN (Svedio)

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO


1. Shunde-gubernio
2. Nanhai-gubernio
3. Xinhui-gubernio
4. Zhongshan
5. Dongguan



Sincera helpo al la kripluloj

Teksto de ZHANG MEIZHI

Fotoj de LI CHUNGENG



En riparado de aŭto



En kriplula familio






Kriplulo en veldado



Kriplaj vendistinoj

Zhou Lixiu





Yuan Shirong kaj aliaj laborantoj

EN iu somera vespero, ĉe la marbordo de Beidaihe aperis dekkelkaj kripluloj kun lambastonoj. Antaŭ la vasta kaj senlima maro ili kun plena eksciteco ripetade kriis: "Ho! Maro!" Iuj eĉ forlasis siajn bastonojn kaj sin direktis al la maro ruliĝante kaj rampante.

Tiuj ĉi turistoj estas laborantoj de la Langshan-a Bonstatiga Societo de Shijingshan-distrikto, Pekino. Ĉi-foje ili venis en Beidaihe aparte organizite de la societo. Iu junulino el la kripluloj diris al mi, ke ŝi antaŭe neniam vojaĝis tiel malproksimen. Por ŝi la vojaĝo estas neforgesebla dum la tuta vivo. La societo ĉiujare okazigas vojaĝon kaj ĉiufoje disponigas du helpantojn por ĉiu kriplulo. Tiele, ili vizitis ĉiujn vidindejojn de Pekino.

La Langshan-a Bonstatiga Societo de kolektiva posedanteco estis kreita de Yuan Shirong, emerito de riparejo sub la Pekina Fer-ŝtala Kompanio. Reveninte hejmen post emeritiĝo en 1979, Yuan Shirong fariĝis estro de la tiea kvartala loĝantara kom-

itato. Rimarkinte, ke iuj abiturientoj estas ĉagrenataj de senlaboreco en la hejmo kaj donis pli da ŝarĝo al la familio, Yuan Shirong fondis kudrejon kun 20 junulinoj. Por 200 juanoj li aĉetis restaĵojn el krudmaterialo post prilaborado de iu vesto-fabriko, por ke la junulinoj faru ilin diversaj malgrandaj varoj en la hejmo kaj poste vendu ilin en la montara regiono. Post 11-jara peniga laboro nun la societo havas pli ol 400 laborantojn kaj la kapitalo superis 2 milionojn da juanoj. Nun ĝi ne nur kudras, sed ankaŭ okupiĝas pri aŭtoriparado, domkonstruado, instalado de elektromaŝinoj kaj kaldronejoj. Pli grave estas, ke la societo solvis problemon por 150 kripluloj en iliaj vivrimedoj, tiel ke ĝi partoprenis en la malfaciloj de la ŝtato kaj socio.

Nun Ĉinio havas 51.64 milionojn da kripluloj. Se ili sin vivtenus depende sole de la ŝtato, ĝi ne povus elteni tiun pezan ŝarĝon. En la pasintaj jaroj la ĉina registaro organizis la kriplulojn en produkta sinsavado, dank' al

kio multaj el ili povis vivteni sin. Ĝis la fino de 1988, en Ĉinio funkciis 40 496 bonstatigaj entreprenoj kun 1.476 milionoj da laboristoj. La ĉina registaro malpliigis aŭ neniigis imposton al la bonstatigaj entreprenoj, kie kripluloj konsistigas pli ol 35% de ĝia totala nombro de laborantoj.

En Shijingshan, kie troviĝas la Langshan-a Bonstatiga Societo, vivas 1 185 kripluloj, por ili la loka registaro funkciigis 45 entreprenojn. La Langshan-a Bonstatiga Societo ja estas unu el ili. Tie laboras plej grandnombraj kripluloj. En la unuaj tagoj ĝi akceptis nur la kriplajn familianojn de laborantoj de la Pekina Fer-ŝtala Kompanio, sed poste akceptis ankaŭ alilokajn kriplulojn.

Kvankam la socio donis multajn laborajn ŝancojn al kripluloj, ilia malfacilo restas pli granda. La 27-jara Zhou Lixiu estas knabino bela, sed kripla je ambaŭ gamboj. Ŝi ekscitiĝis, parolante pri sia serĉado de laboro post abiturientiĝo. Komence ŝi laboris en malgranda fabriko kaj post ne-

longe estis eksigita pro depresio de la produktado. Poste ŝi por tempe laboris en restoracio. 7 monatojn por gravediĝo, ŝi daŭrigis sian laboron, por fariĝi oficiala laboristino. Sed ho ve, ŝi estis maldungita ankoraŭfoje. Ankaŭ ŝia edzo estis eksteretata laboristo. Pro malriĉo ili ne povis vivteni sian filon post lia naskiĝo. Tiam ŝi vere afliktiĝis. Kiam ŝin turmentis la grandaj malfaciloj, oni proponis, ke ŝi iru al Langshan. Tie ŝin favoris la fortuno. Laŭ ŝiaj kapablo kaj sanstato, la societo aranĝis, ke ŝi laboru kiel administranto de la tenejo de la aŭto-ripara grupo.

La Langshan-a Societo ne nur donis laboran ŝancon al junaj kripluloj, kia Zhou Lixiu, sed ankaŭ ilin prizorgas kaj respektas. Ĝi neniam rigardas ilin kiel ŝarĝon, sed donis al ili konvenan laboron. Ĝi aranĝis, ke la bone klerigitaj gejunuloj kriplaj je membroj, laboru, kiel kontisto, budĝetisto, administranto k.a.; la kripluloj kun sana intelekto, sed malmulte klerigitaj, funkciu kiel elektroveldisto, ĉarpentisto, masonisto, tornisto, metallaboristo, kaj tiuj kun malbonaj intelekto kaj sanstato, sed laborkapablaj laboru, kiel noktogardisto, floristoj k.a.

La societo donas grandan atenton al teknika trejnadado de kriplaj gejunuloj, studigas ilin en altlernejo, kaj funkciigas por ili tekniko-kurson. La 21-jara abituriento Feng Changyi aspektas kiel infano pro nesufiĉa denaska kresko, sed li estas sorba, afabla kaj diligenta. Konfirminte, ke li estas promesplena junulo, la societo sendis lin lerni en postlabora altlernejo kaj pagis por li ĉiujn elspezojn. Nun li jam akiris pli ol 10 fakajn diplomojn. Junulino Han Guiqin, kripla je mano, decidis fariĝi kuracistino por forigi suferon de kripluloj. Tion informinte, la societo aranĝis, ke ŝi kompletigu siajn sciojn en ĉinmedicina instituto kaj dum ŝia lernado la societo ne nur pagis



Junaj kripluloj sur la Granda Muro

ĉion por ŝia lernado, sed ankaŭ ŝin salajris.

En la lastaj jaroj la societo investis pli ol 30 000 juanojn por kulturaj kontistojn, veldistojn, elektristojn, barbirojn, tajlorojn, vartistinojn k.a. Nun, ili ĉiuj bone laboras.


Koncerne aliajn bonstatigajn aferojn de la laborantoj, Yuan Shirong, la nuna estro de la societo, diris al mi, ke la societo nun subvencias pli ol 40 kriplulojn perdintajn laborkapablon, ankaŭ kiuj jam faris simplan laboron, sed fakte la societo vivtenas ilin. En la festotagoj la societo portas donacon al ili. Krome la societo aranĝas, ke ili vojaĝu aliloken.

La societo zorgas ankaŭ pri la vivrimedoj de siaj laborantoj en la estonteco. Ekde 1986, ĝi elspezis unufoje pli ol 400 000 juanojn por asekuro pri ilia vivtenado post emeritiĝo. Ĉiuj laborantoj servintaj pli ol 6 monatojn en la societo povas ĝui tiun rajton. Tiel, ili ricevos el la asekura kompanio 60-160 juanojn da pensio ĉiumonate post la emeritiĝo. Tial la kripluloj ne plu maltrankviliĝas pri sia estontata vivo.

Plejparto de la laborantoj de la societo estas sanuloj. Sendube ili faris pli grandajn kontribuojn al

la kolektivo ol la kripluloj. Sed kiam la produkto kreskis, ili zorgas antaŭ ĉio pri favoro al la kripluloj por faciligi ilian vivon kaj laborkondiĉojn, ekz., per investita mono ili starigis medicinan stacion por senpage kuraci malsanojn por kriplaj laborantoj. La societo konstruis infanĝardenon, kiu solvis la malfacilon de la kripluloj en varto de la infanoj. Estas menciinde, ke komence la infanĝardeno prizorgis la infanojn nur tage. Rimarkinte la malfacilojn de iu blinda paro en ĉiutaga kondukado de la infano al la infanĝardeno, la societo decidis, ke la infanĝardeno prizorgu infanojn tag-nokte, loĝigu la infanojn al la infanĝardeno kaj veturigu ilin hejmen per aparta aŭto. La societo fondis por kripluloj svat-agentojn, dank' al kiu 28 kriplaj gejunuloj fondis sian familion. Oni diris, ke la societo konstruos kriplulan apartamenton, por ke ili loĝu en vasta ĉambro. Trafe diris la tieaj kripluloj, ke la societo estas vere zorgema al ili.

En la Langshan-a Bonstatiga Societo ja estas nur 150 kripluloj, vere malgranda nombro por la tuta socio, sed tamen tio, kion ĝi faris, vere varmigas la koron de la tuta socio. ■



La centro de maljunuloj en Daliang-urbeto

VOJAĜO EN LA DELTO DE PERLO-RIVERO (3)

Nova koncepto de la ĉinaj kamparanoj





En fabriko de mikroondaj bakuj




En vilaĝa restoracio

Teksto de ZHENG ZHENJIE
Fotoj de WU XINHUA

En Lecong-urbeto

En farejo de palmofoliaj ĉapeloj en Xinhui





Ou Jianquan

EKLABORI ĉe sunleviĝo, ri-
pozi post sunsubiro, semi
printempe, sarki somere, ri-
kolti aŭtune kaj konser-
vi vintre — jen produkt- kaj
vivmanieroj de ĉiuj generacioj de
la ĉinaj kamparanoj.

Tamen en la lastaj dek jaroj
en la Delto de Perlo-rivero same
kiel en aliaj regionoj kun rapide
disvolviĝantaj urbataj entrepre-
noj la vilaĝoj tute ne estas tradi-
ciaj, nek la kamparanoj similas
al la antaŭaj.

PROSPERAJ URBETOJ

Mi iris de loko al loko en la
Delto de Perlo-rivero. Tie multaj
aferoj estis ekster mia atendo kaj
ege mirigis min. Ekz. en la kam-
paro kun prosperaj plantoj aperis
multaj vivoplenaj urbetoj kaj in-
dustriaj vilaĝoj. Sur ŝoseo nave-
tas veturiloj. De tie oni transpor-
tas al urboj ne nur abundon da
agrikulturaj kaj industriaj pro-
duktaĵoj, sed eĉ precizajn ilma-
ŝinojn, instrumentojn, elektrajn
aparatojn por hejmoj, vicpecojn
por avangardaj ekipaĵoj kaj ek-
sportaĵojn de monda nivelo. Rongqi kaj Guizhou de la guber-
nio Shunde ja estas tiaj novaj
urbetoj.

Por mi Rongqi kaj Guizhou ne
estas fremdaj, ĉar mi vizitis ilin

antaŭ dek jaroj. Tiam ili estis
unu tutaĵo nomata Guizhou-a
Popola Komunumo. Mankis al
ili bona fabriko, kaj estis fierin-
daj por ili nur altproduktaj riz-
kampoj kaj fiŝlagetoj ĉe proksi-
maj vilaĝoj.

Nun Rongqi fariĝis preskaŭ
nerekonebla por mi ne nur pro
tio, ke aperis tie novaj loĝdomoj
de kamparanoj, hoteloj, restora-
cioj, bankoj, poŝtoŝtancoj, kinejoj,
lernejoj, sporthaloj kaj hospita-
loj, larĝiĝis la stratoj kaj grand-

ĝis la haveno, sed ĉefe pro tio,
ke ĝi turniĝis el malgranda meti-
industrial urbetoj en rudimen-
tan modernan industrian urbeton.
Tie oni starigis fabrikojn
de maŝinoj, instrumentoj, meta-
laĵoj, kemiaĵoj, plasto, tekstilaĵoj,
vestoj, konstru-materialoj, tink-
turejon, prilaborejon de brutonu-
traĵo kaj eĉ fabrikojn de elektraj
aparatoj por hejmoj. Inter la pli
ol cent entreprenoj de la urbetoj
troviĝas du, kies jara produkto-
valoro superis 100 milionojn da
juanoj, kaj ok, kies jara produk-
tovaloro superis 10 milionojn da
juanoj. Krome, fridujo kun mar-
ko "Rongsheng", elektra marmi-
to, zinkita fera drato, grajna bru-
tonutraĵo k.a., sume pli ol 20
specoj da produktaĵoj, gajnis
provincan aŭ ŝtatan bonkvali-
tan premion. Guizhou-urbeto
najbare de Rongqi disvolviĝis pli
rapide. Ĝia totala produktovalo-
ro de industrio kaj agrikulturo
en 1989 superis miliardon da ju-
anoj. Sed la totala produktovalo-
ro de industrio kaj agrikulturo
en unu aŭ du gubernioj en norda
Ĉinio estas tiom da juanoj.

En vilaĝoj proksime de la du
urbetoj mi ofte vidis precipe ma-
tene, ke gefiloj de kamparanoj

Ĉindevenaj usonanoj vizitas tekstilejon.



biciklas sur strato. "Kien?" mi demandis ilin. "Al laboro!"

Kamparo ligiĝas kun fabrikoj kaj laboristoj eliras el kampara domo. Ili forlasis kampon, sed ne kamparon. Tio ne nur evitigis serion da gravaj ekonomiaj kaj sociaj problemoj kaŭzitaj de tio, ke kamparanoj torentas en urbon, sed ankaŭ pliigis la enspezon de kamparanoj kaj malgrandigis la diferencon inter la urboj kaj kamparo kaj inter la laboristoj kaj kamparanoj. Oni ne povas ne diri, ke tio estas nova afero en la ĉina kamparo.

ETAĜDOMOJ DE KAMPARANOJ

En tiuj vivoplenaj urbetoj kaj proksimaj vilaĝoj mi ofte vidis etaĝdomojn kun fabriknomoj skribitaj en la ĉina kaj alilanda lingvoj. La etaĝdomo de la Yuhua-a Industria Kompanio de Beijiao-urbeto en Shunde-gubernio vizitita de mi ja estas unu el ili. Ĝia fondinto estas indiĝena kamparano Ou Jianquan. Ĉar la kompanio estas vilaĝa entrepreno, la lokanoj nomas la domon "kamparana etaĝdomo".

Iutage, apenaŭ mi atingis la kompanion, mi vidis grizan aŭton alveturanta de malproksime. En la aŭto sidis nur ŝoforo. Li estis neniu alia ol Ou Jianquan.

Liaj kolegoj diris, ke li ne volas, ke oni rigardu lin kiel "gvidanton". Li esperas, ekde tiu ĉi generacio, starigi figuron de kamparana entreprenisto. Post kiam li establis la kompanion, li faris multajn decidojn, inter kiuj unu estas, ke la respondeculoj de la kompanio kaj ĝiaj sekcioj ĉiuj devas ellerni veturigi aŭton. Tio por la eksterlandanoj eble estas bagatelo, tamen por la ĉinaj ŝtatoficistoj kaj entreprenistoj ne tiom facila.

En la kabineto de Ou Jianquan troviĝas multe da freŝaj floroj, la planko estas tapiŝita, sur la tablo estas du programe regataj tele-



Novaj domoj de kamparanoj

fonoj, kiajn ĵus komencis uzi nur malmultaj personoj en la ĉinaj grandaj urboj. Per ili li povas en ajna tempo intertrakti pri komercado kun entreprenistoj de diversaj lokoj de Ĉinio kaj aliaj landoj. Li diris al mi, ke ĉar de la infaneco li vivas en vilaĝo, li scipovas terkulturadon, fiŝbredadon, florplantadon, remadon k.a., kaj li iam laboris kiel kasisto de vilaĝo kaj vicestro de saŭca fabriko de Beijiao-urbeto. Iun vesperon de septembro 1983 li sciigis de televida reklamo por alia lando, ke en la internacia merkato aperis novtipa elektra ventumilo farita el plasto anstataŭ metalo. Ĝia produktokosto estas malalta kaj ĝi estas sekura kaj malpeza, tiel grandioza plano naskiĝis en lia cerbo.

Hodiaŭ, post ses jaroj, kiam mi vizitis la etaĝdomon starantan apud fiŝlageto kaj bananarbaro, Ou Jianquan jam fariĝis mastro de moderna korporacio, kiu serie produktas elektrajn ventumilojn kun marko "Hongyun" kaj serie kuirejajn bezonaĵojn kaj aliajn dekojn da specoj kun jara produktovaloro de centoj da milionoj da juanoj kaj jara enspezo de milionoj da usonaj dolaroj. Tiu ordinara faro de kamparano eĉ fariĝis ŝanco akce-

li renovigon de elektraj ventumiloj en Ĉinio kaj strebo de la ĉinaj fakuloj al la avangarda monda nivelo.

NOVA FIGURO DE KAMPARANO

Antaŭe oni ĉiam rigardis kamparanojn egoismaj, malgrandanimaj, proksimvidaj kaj konservativaj. Multaj kamparanoj, kiujn mi renkontis en la Delto de Perlo-rivero, sin liberigas de spirita kateno altrudita de la subpremado kaj ekspluatado de la feŭda sistemo en 2 000 jaroj, forĵetas la pezan ŝarĝon de rutino de etproduktantoj kaj modlas sian novan figuron dum la reformado.

En la antaŭurbo de Humen-urbeto mi iris al kampo laŭkontrakte kulturata de Chen Yaoguang, kies familio havas 4 membrojn. Tiutage liaj du infanoj vizitis lernejon kaj li iris al Humen-urbeto pro afero. Min akceptis lia edzino laboranta sur la draŝejo. Ŝi diris, ke ŝia familio kulturas 15 hektarojn da agroj laŭ kontrakto ĉefe por rizo kaj tiujare povas rikolti 86 000 kg da rizo. En la lastaj jaroj ŝia familio riĉiĝis, ne nur konstruis tri-etaĝan domon same kiel aliaj familioj en la vilaĝo kaj havigis

al si nemalmultajn elektrajn aparatojn, sed ankaŭ aĉetis traktoron kaj falĉomaŝinon. Ŝi aldonis, ke ĉe la komenco de laŭkontrakta kulturado antaŭ kelkaj jaroj la vilaĝanoj dubis pri agrikultura mekanizo. Tiutempe la kamparanoj aktiviĝis, tamen ili ne estis riĉaj kaj povis aĉeti nur bubalojn kaj malgrandajn agrikulturilojn. Sed post nur kelkaj jaroj preskaŭ ĉiuj laŭkontrakte laborantaj familioj aĉetis traktorojn kaj aliajn agrikulturajn maŝinojn.

Mi rimarkis, ke kvankam en la familio de Chen Yaoguang nur du personoj laboras, tamen ili orde aranĝas produktadon kaj vivas harmonie. Dum nia interparolado mi sciis, ke krom kulturi teron, ilia familio ankaŭ bredas fiŝojn, porkojn, anasojn kaj meleagrojn. Nun maturiĝis malfrua rizo, ore flava kaj tre plaĉa. Ĉe la draŝejo estas oblonga fiŝlagejo, sur kies bordo kreskas banan-

arboj kaj bambuaro. Ne malproksime verdas legomkampoj. La mastrino diris al mi, ke dum la tuta jaro iliaj kampoj produktas preskaŭ ĉiajn legomojn, kiajn oni vendas en la merkato. Se oni volas brasikon aŭ fiŝon, oni povas laŭplaĉe akiri tie en ajna tempo.

Vespere mi refoje venis en la vilaĝon kun arbare starantaj etaĝdomoj kaj vidis, ke ambaŭflanke de la strato sub la milda lamplumo kamparanoj vendas vestojn, ŝuojn, fruktojn k.a. La strato estis movoplena. Iuj junuloj biciklis aŭ motorciklis al Humen-urbeto por sin distri. Laŭdire, la tieaj teatro, bildbenda projekciejo, amuzejo, dancejo kaj kafejo ĉiuvespere estas homoplenaj. En la vilaĝo mi vidis, ke kamparanoj, kies manoj antaŭe estis kalaj, nun kun granda intereso ludas bilardon kaj tiuj, kiuj antaŭe estis analfabetoj, nun ofte vizitas scienc-teknikan kon-

sultejon por lerni sciojn pri terkulturo.

En la Delto de Perlo-rivero mi vidis kaj aŭdis ankaŭ, ke iuj kamparanoj sin ĵetis en ekspluatadon kaj konstruadon, kun pli granda celo. Ili komencis penigan laboron por ĉiuflanke ekspluati kaj transformi teron kaj plene utiligi diversajn naturajn riĉfontojn. Ekz. juna kamparano Ye Qinhai de la urbo Dongguan laŭkontrakte prilaboras monton kun areo de 14 hektaroj. Li diris al mi, ke li decidis turni la lokon en modernan familian fermejon. Kaj li intencis radikale ordigi la kalvan monton. Por tio li devas investi 800 000 juanojn kaj formovi 200 000 kubmetrojn da tero kaj ŝtonoj. En la lastaj jaroj li donis al tiu nova plano la tutan profiton, kiun li akiris post rikolto de sezonaj plantoj. ■

Ni dankas la kontribuintojn por "Mi kaj Ĉinio"

De oktobro 1989 ĝis la 31-a de januaro 1990 ni ricevis sume 41 artikolojn el 21 landoj skribitajn por la rubriko "Mi kaj Ĉinio". La artikolo de Mario Prestinari (Brazilo) la unua atingis nin. Kiel plej granda kontribuinto, Brazilo donis al ni sep artikolojn.

La juĝkomitato el 4 niaj laborantoj serioze traktis ĉiujn artikolojn kaj fine en la 16-a de marto aljuĝis la unuan premion al "Retrospektive al la 40 jaroj de EPĈ" verkita de William Auld (Britio), la duan premion al "Bela Rememoraro" de Bodil kaj Gustav Kuhlmann (Danlando), "Leciono" de Raymond Wylleman (Belgio) kaj

"Mia bildo pri Ĉinio" de Krzysztof Zero (Pollando) kaj la trian premion al la artikoloj de Szentgyorgyi Zoltan (Hungario), Ralf Kuse (GDR), Stanislaw Winnicki (Pollando), Alirio J. Jugo S. (Venezuelo) kaj George O. Vaske (Brazilo).

Ni gratulas la suprajn aŭtorojn!

Inter la verkintoj iuj estas niaj malnovaj legantoj kaj aliaj novaj. Tamen iliaj artikoloj havas ion komunan, t.e. ili de malsamaj flankoj rakontis, kiel ili pli bone konis Ĉinion pere de legado de EPĈ, kaj pere de la lingvo Esperanto kaj vojaĝo en Ĉinio, kaj esprimis sian amikan senton al la ĉina popolo kaj ĉinaj esperantistoj. Pro tio ni

kore dankas ilin.

Estas bonaj ankaŭ tiuj artikoloj, kiuj ne estas premiitaj, kaj ilin ni laŭeble aperigos en nia revuo. Tamen pro la limigiteco de la paĝoj ni ne povas publikigi ilin ĉiujn kaj petas komprenon de la aŭtoroj nesukcesintaj.

Laŭ nia promeso ni jam sendis ĉin-stilan metiartaĵon al ĉiu premiito kaj memorajon al ĉiu nepremiita kontribuinto.

La Red.

Rimarko: Ĉiuj menciitaj titoloj de la artikoloj estas aldonitaj de ni.

ESPLORVOJAĜO TRA AZIO

— KONKLUDOJ, PLANOJ...

Dum unujara esplorvojaĝo tra Azio s-ro Joachim Werdin donis al ni valorajn informojn pri la E-movado en kelkaj aziaj regionoj malmulte konata de ni kaj semis ĉie la verdan semon. Ni kune flegu per nia senlaca klopodado ĝiajn ĝermojn kaj atendu kun espero la rikolton.

La Red.

Je la 12-a de decembro 1989 mi finis la esplorvojaĝon tra Azio komencitan je la 29-a de decembro 1988. Jen lokoj, en kiuj mi laboris por Esperanto: Israelo (Telavivo, Hajfo, Jerusalemo), Turkujo (Istanbulo), Pakistano (Karaĉio, Multano, Lahoro, Ravalpindio, Islamabado, Mario, Ĝelemo), Hindujo (Novdelio, Kalkuto, Bangaloro), Malajzio (Kualalumpuro), Singapuro, Papuo-Nov-Gvineo (Porto Moresbio, Madango), Tajlando (Bankoko), Vjetnamujo (Ho Chi Minh-urbo, Hanojo), Nepalo (Katmanduo).

Raportojn pri la agado en la menciitaj lokoj vi povis legi en Esperantaj gazetoj, nun mi volas skribi iom da konkludoj aperintaj post la 50-semajna plenatempa aktivado por Esperanto. Ĉio, kio estas skribita ĉi tie, koncernas nur la landojn menciitajn ĉi tie supre, kvankam supozeble oni povas konstati, ke kelkaj aferoj estas pli universalaj. Unue tri faktoj.

1. Ĝenerale la vorto Esperanto estas ne konata, nur kelkaj homoj iam ion aŭdis pri tio kaj ili plej ofte havas falsan opinion pri la afero.

2. Esperantaj lernmaterialoj estas tute ne aĉeteblaj en la vendejoj, oni povas vidi ilin nur ĉe esperantistoj.

3. La angla lingvo preskaŭ ĉie estas la unua kondiĉo por profesia kariero. Ĝi estas necesa, se oni volas aktivi en internacia kampo. En kelkaj landoj ĝi jam anstataŭas gepatran lingvon eĉ en familiaj rilatoj.

toj.

En tiu situacio, karakterizita de la tri punktoj, la diskoniganto de Esperanto demandas sin ofte: ĉu estas senco fari tiun Sizifan laboron?

En tiuj landoj estas malmulto da esperantistoj kaj ilia nombro ne ŝanĝiĝas aŭ kreskas malrapide.

La tieaj esperantistoj havas ne multajn eblojn kontakti persone kun eksterlandanoj, malofte iu venas por viziti ilin (tial ili kore kaj varme akceptas tiun kiel honoran gaston). Ili persone ne povas vojaĝi eksterlanden pro tro altaj vojaĝkostoj. Tiu izoliteco ne emigas al por-Esperanta agado.

La lingva nivelo de esperantistoj ĝenerale ne estas alta, tion kaŭzas manko de bonaj, seneraraj lernlibroj kaj instruantoj.

Ĉio ĉi sonas ne optimismige, sed tio ja ne signifas ke ni rezignu. Fakto neŝancelebla estas, ke miloj (por ne paroli eĉ pri milionoj) da homoj volas lerni la internacian lingvon. Ili ŝatas la ideon kaj emas apogi la movadon. Estas ankaŭ pluraj personoj, kiuj volas labori por la afero, sed bezonas gvidadon kaj spertigon.

En tiu situacio, kie iuflanke aperas malforta, malgranda Esperanto-movado kaj kontraŭflanke amasiĝas potencialaj fortoj kaj ebloj, ni devas havi ne nur bonan strategion, sed ankaŭ efikan organizadon, novajn agadmetodojn kaj ideojn, kiuj estas ligitaj al konkretaj projektoj kun financa bazo.

Tiu konkludo venas ne el la aero, ĝi estas konstato aperinta post praktike plenumita laboro en Azio en 1989. Legante la artikolojn "Esplorvojaĝo tra Azio" — vi povis mem trovi ke ekz.:

en Bangaloro (suda Hindujo) ekstis Esperanto-Centro, post kiam pli ol 50 personoj finis E-kurson;

en Kualalumpuro (Malajzio) kaj Singapuro aperis landaj E-asocioj, post kiam respektive proksimume 50 kaj 120 personoj finis E-kursojn;

en Porto Moresbio (Papuo-Nov-Gvineo) kaj Bankoko (Tajlando) estis fondataj respektive Esperantista Grupo kaj Esperantista Klubo.

Tio estis 1989, nun estas novaj projektoj realigendaj, jen ili:

organizo de Esperantaj kursoj en Filipinoj, Hongkongo, Tajvano, Indonezio (ili estas lokoj, kie praktike ne ekzistas la movado);

fondo de esperantistaj organizaĵoj en tiuj landoj kaj lokoj;

fondo de Azia Esperantista Edukejo en (plej verŝajne) Singapuro;

organizo de seminario pri por-Esperanta agado en Azio;

eldono de lernlibro kun kaseto (por azianoj).

Tiuj projektoj estos realigataj pli aŭ malpli rapide depende de diversaj faktoroj, precipe de la financa bazo.

Pensinte profunde respondu al vi la demandojn:

Ĉu estas grave popularigi Esperanton en tiu mondparto, kie loĝas pli ol 60% de la homaro?

Ĉu vi volas kontribui al evoluigo de la azia Esperanta movado?

Viajn respondojn volonte legos



la artikolaŭtoro*.

Ankaŭ ĉiuj demandoj, proponoj, kritikoj estas de li atendataj, krome "Esperanto en Azio" estas mendebla.

Nun estas peto kaj alvoko pri financa helpo, sen kiu la supraj projektoj ne povos esti realigitaj. Ĉiu povas helpi, sed nur malmultaj emas fari tion, de tiuj malmultaj dependos nia efikeco en Azio.

Ĉu vi aliĝos? Vi povas pagi vian monon rekte al konto destinita por evoluigo de la azia Esperanta movado: UNITED OVERSEAS BANK, ACCOUNT NO

101-148-219-3 WERDIN, SINGAPORE 0104.

Fine, jen adresoj de novaj Esperantaj organizaĵoj por ke vi povu kontakti kun ili kaj sekve kunlabori:

Bangalora Esperanto-Centro c/o S. S. Pradhan 97, 24th Cross III Block East Jayanagar, Bangalore 560011 India

Malazia Esperanto-Asocio sekretariino f-ino Siva Devi 42, Lorong Kampong Pandan 55100 Kuala Lumpur Malaysia

Singapura Esperanto-Asocio prezidantino f-ino Lee Kim Kiew 11,

Jalan Batu # 04 - 152 Singapore 1543

Esperantista Grupo de Porto Moresbio c/o John Shadlow Geography Department University of PNG, Box 320 University, N.C.D. Papua New Guinea

Esperantista Klubo de Bangkok c/o Pho Thamkhajadpaikun 42, Areesamphan 5 Rama 6 Rd Phayathai. Bangkok 10400 Thailand ■

* La adreso de la aŭtoro estas: Joachim Werdin, Pionierow 6A9, 47-220 Kedzierzyn, Pollando.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondekuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizaĵoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* 40-j. komercisto dez. kor. tm. Adr.: Li Yamin, Xierdaojie 17-1, 161006 Qiqihaer, Heilongjiang, Ĉinio.

* 26-j. laboristo dez. kor. kun ĉiugaĝaj esp-istoj pri ĉt., kolektas kaj interŝ. E-librojn, pm., bk., ktp. Adr.: Lu Shengrong, Ji Xie Xiu Zao Chang, Ge Zhou Ba Gong Cheng Ju Di Si Gong Cheng Gong Si, Yichang, Hubei, Ĉinio.

* Adresaro-1989 kun pli ol 300 enskribitoj kaj 100 personfotoj, estas havebla senpage. Petu ĝin al Tutmonde, pacifista movado, Apartat 313, 08220 Terrassa, Hispanio.

* Venezuelana E-unuiĝo kore petas vian monhelpon en usonaj dolaroj aŭ en okcidenteŭropaj bankbiletoj pro financaj problemoj en diversaj E-agadoj. Venezuelana Esperanto-Unuiĝo (David G. Valecillos), Calle 79 N-ro 3C-72, Maracaibo-4002, Venezuelo.

* 23-j. fraŭlo dez. kor. kun esp-istoj el Hispanio, Italio kaj Aŭstralio pri muziko, literaturo kaj ĉina ludo go. Klaus Konig, Hermannstr. 16, Augsdorf, DDR-4251.

MI KAJ ĈINIO



La aŭtoro

Post legado de "EPC"

de MIKAELO BRONŜTEJN (USSR)

*Ĉe l' ombraj pinoj, en miraklaj montoj
Mi ĝuis guston de la akvo pura.*

*Mi tuŝis ŝtonojn de la Granda Muro,
Kaj kun amikoj ridis dum renkontoj.*

*Min ravis loge tradiciaj festoj,
Prudenton poezian mi admiris.*

*Kun pio kaj scivolo mi eniris
L' antikvan urbon de l' imperiestroj.*

*Teumis mi kun la amiko-ĉino
Dum la ripoz', se l' pensoj miaj lacis.*

*Mi foje eĉ sukcese min kuracis
Dank' al la spert' de l' fama medicino.*

*Mi la miraklan mondon reve plonĝis,
Paŝante en urbegojn kaj vilaĝojn.*

*Foliumante tiujn logajn paĝojn,
Ĉu estis tio, aŭ mi tion songis?*

*Revante ĉiam pli l' numeron pluan
Kun dankesprim' atestu mi, leganto:*

*Tutcerte, la amiko de l' revuo
Fariĝas la amiko de la lando.*

Mi kaj EPĈ

de SZENTGJÖRGYI ZOLTÁN (Hungario)

DE ses jaroj mi estas regula leganto de EPĈ. Dum tiuj ses jaroj la revuo kaŭzis al mi multajn agrablajn, senzorgajn minutojn, ofte horojn. Kiu ne legas EPĈ, tiu ne povas imagi, kiom multajn, kolorajn, tre utilajn informojn oni povas akiri, kun helpo de Esperanto, pri la Ĉina Popola Respubliko, pri ĝiaj nacioj kaj pri multegaj nacimalplimulto, pri ĝiaj kulturoj, moroj, ankaŭ pri la zorgoj, pri la historia pasinteco, estanteco kaj ankaŭ pri la futuro de la granda lando.

Pere de EPĈ kvazaŭ permane atingebla iĝas la gigantaj konstruoj de la ĉina popolo.

Kiam mi plezure rigardas la belajn kaj pli belajn, kolorajn bildojn kaj legas la kompreneblajn, klarajn tekstojn, mi estas kvazaŭ en ekzotika, mistika, sed tamen por mi nefremda mondo. Ankaŭ ni hungaroj venis de oriento, el Azio, tial mi sentas naturan kaj profundan simpatian al la orientaj homfratoj. Laŭ mia opinio EPĈ krom multflanka kaj vastasfera konigado de Ĉinio — dum 40 jaroj — en signifa mezuro kontribuis al la kultura evoluo de la Esperanta mondo. Mi kun esperego kaj kun plena atendo rigardas al la ĉina Esperanta movado.

Ofte la priskriboj kaj la bildoj estas tiel interesaj kaj katenigaj, ke mi forgesas, ke ne hungare sed Esperante legas. Estas mia propra sperto, ke EPĈ per siaj ĝenerale kompreneblaj, klaraj, pri ĉio kampoj de la vivo parolaj priskriboj kaj artikoloj en la granda mezuro servas la amuzan praktikon, amigon kaj rekonon de la Esperanta lingvo en la tuta mondo.

Estas obseda la kelkmil-jara kulturo kaj vekas estimon la gardo de la tradicioj. Mi ekzemple mencias, ke mi el EPĈ pli ol unu jaron antaŭe informiĝis pri la 2000-jaraj terakotaj militistoj ol nia landa amaskomunikilo sciigis tion. En la Budapeŝta ekspozicio, en la Nacia Muzeo mi rigardis ĉirkaŭ 30 terakotajn statuojn, kaj por mia nepino mi aĉetis grandan afiŝon pri militisto kun ĉevalo.

EPĈ sinceran bildon montras al mi pri Ĉinio. Ĝi raportas ne nur pri entuziasmigaj sukcesoj, sed ankaŭ pri pezaj zorgoj. Mi al EPĈ povas danki, ke mi la ĉinan starpunkton senpere povas ekkoni pri la gravaj, decidaj eventoj. Estas tre utilaj la artikoloj kaj konsiloj interligitaj kun sanigaj metodoj. Kelkajn ekzercojn ankaŭ mi regule, tage plenumas.

Estas grandioza iniciato kaj imitinda ekzemplo de la Ŝanhaja Nankin-strata "Volontula Tago". Ĝi estas vere entuziasmiga, al homo inda agado.

EPĈ estas fenestro por mi rigardi al Ĉinio kaj al la Esperanta mondo. Bedaŭrinde, mi ne posedas detalan Esperantan mapon pri Ĉinio. Dank' al "Korespondi Deziras" de EPĈ mi akiris jam tri fojojn korespond-amikojn, unue el Finnlando kaj poste el Ĉinio kaj Svedio.

Okaze de la 40-a datreveno mi elkore deziras al EPĈ multajn sukcesojn kun samideana estimo kaj saluto! ■

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1990

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	15.50	25.5	35.5
Aŭstrio	ATS	210	350	490
Belgio	BEF	600	980	1350
FR Germanio	DEM	32	52	72
Britio	GBP	9	14.5	20
Finnlando	FIM	70	115	160
Francio	FRF	100	160	220
Hispanio	ESP	1500	2400	3400
Italio	ITL	20000	32500	45000
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35	59	83
Nov-Zelando	NZD	21	35	49
Portugaliao	PTE	1500	2400	3400
Svisio	CHF	26	43	62
Usono	USD	15	25	35
Kanado	CAD	15	24	34

Por aliaj landoj en Eŭropo:

USD 11 18 25

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

USD 7.5 12 17

Generala distribuanto: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJISHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Ĉina ekonomio en reguligo

DE la jarfino de 1989 Ĉinio komencis sian "reguligon de ekonomia medio" (Legu EPĈ, n-ro 4, 1989). Kion ĝi rikoltis en la pli ol unu jaro?

En 1989 la ekonomiaj atingoj de Ĉinio estis kaj ĝojigaj kaj ĉagrenaj. Unuflanke Ĉinio akiris kompare bonan rikolton de agrikulturo. Igrade mildiĝis la socia kontraŭdiro inter provizo kaj bezono, malpliigis la kresko de la investo de la fiksjaj kapitaloj, malrapidiĝis la kresko de la konsumado kaj malpliigis la inflacio. Tio montras, ke la reguligo donis unuapasaĵajn pozitivajn rezultojn antaŭe difinitajn. Aliflanke estiĝis iuj novaj malfaciloj, kiaj merkata depresio, malpliigo de la industria disvolviĝo, superstokiĝo de iuj produktaĵoj, pliiĝo de la entreprenoj, kiuj ĉesis aŭ duonĉesis produkti. Ĉio ĉi fariĝis novaj faktoroj, kiuj ĝenas la ekonomian disvolviĝon kaj malutilas al la socia stabileco. Oni devas senprokraste ŝanĝi tiun fenomenon.

ATINGOJ

La gravaj ekonomiaj atingoj publikigitaj de la Ŝtata Statistika Buroo, Ŝtata Komisiono de Planaĉo, Ministerio de Financoj kaj la Ĉina Popola Banko montras:

En 1989 Ĉinio rikoltis 40 745 tunojn da greno kaj kreis la novan rekordon en la historio;

Mildiĝis la prezaltiĝo. En la komenco de la pasinta jaro la prezo de podetala vendo leviĝis je 26%, sed en decembro ĝi falis al 6.4%.

Malpliigis la investo de la fiksjaj kapitaloj de la tuta socio, kiu

senĉese dilatiĝis en la lastaj jaroj, pliboniĝis la investa konsisto. En 1989 la entreprenoj de la tutpopola posedanteco investis 251 miliardojn da juanoj kiel fiksjajn kapitalojn, kiuj falis je 9.2% kompare kun tiu en 1988. Koncerne la strukturon, la produkta investo kreskis de 65.9% en 1988 ĝis 68.4% en 1989. La investo en energiaj, trafikaj kaj poŝtkomunikaj unuoj kreskis. Dume la neprodukta investo falis de 34.1% al 31.6%.

Unuapase bremsiĝis la konsumo dilatiĝo, malrapidiĝis la salajra kresko. En la pasinta jaro la totala salajro de la tutlandaj laboristoj kaj oficistoj estis 264 miliardoj da juanoj, je 14% pli multe ol tiu en 1988, alivorte ĝia kresko malpliigis je 9.1% kompare kun tiu en 1988.

PRI LA MERKATA DEPRESIO


La Foiro de Ekstera Ekonomio kaj Komerco en Pekino, 1990



Samtempe kun la atingoj de la ekonomia reguligo aperis grand-skala malprospero de la merkato, kion oni ne konis en la lastaj 10 jaroj. Ĉinaj ekonomikistoj nomas tion merkata depresio.

En la somero de 1989, kiam la ĉinojn daŭre maltrankviligis la landskala troaĉetado en aŭgusto kaj septembro de 1988, la totala sumo de la podetala komerco evidente falis. En aŭgusto, septembro kaj oktobro eĉ aperis negativa kresko. Tiam la vendosumo falis je 0.7%, 1.1% kaj 0.3% respektive kompare kun tiuj en la sama periodo de 1988. Serioze stagnis la vendo de televidiloj, fridujoj kaj aliaj altvaloraj varoj, kiuj iam havis grandan debiton.

Kial aperis tiu depresio? Oni opinias, ke tio kaŭziĝis de jenaj faktoroj: La plurfoja troaĉetado donis grandan influon de prokrastita



Sur strato Wangfujing de Pekino

aĉetado. La antaŭaĉetado stokigis iajn varojn ĉe la klientoj, kio malutilas al la vendado en la sekvantaj jaroj. La alta prezo malutilas al la vendado. Sed fakuloj opinias, ke ĝia ĉefa kaŭzo kuŝas en tio, ke en la unua jaro, post kiam Ĉinio ekpraktikis la ekonomian reguligon, evidente pliboniĝis la merkata ordo kaj merkata medio. La registaroj de diversaj lokoj serioze traktis la malordon en la cirkula kampo, nuligis iujn netaŭgajn kompaniojn. Koncernaj departementoj punis la fabrikantojn de malbonkvalitaj, pseŭdomarkaj varoj, malpermesis la ŝakradon, akaparadon k.a. Dank' al la praktikado de la rimedoj por stabiligi la prezon la registaro efike bremsis la prezaltiĝon de iuj varoj, precipe tiun de manĝaĵoj. Ĉio ĉi mildigis la timon de la loĝantoj. La bankoj levis la depon-interezion, funkciigis valorkonservan deponon, emisiis obligaciojn k.a. Dank' al tio la ŝtato kolektis grandnombron da mono kaj samtempe malpliigis la socian aĉetpovon kaj rezulte de tio moderiĝis la streĉiteco de la merkato.

La merkata depresio ne ŝanĝiĝis hodiaŭ. Fakuloj taksis, ke ĉi-jare la ĝenerala tendenco de la enlanda merkato estas kuna ekzisto de la depresio kaj streĉiteco. Laŭ ili la du fenomenoj estiĝis de la sama kaŭzo, t.e. nesufiĉo de la varoj ŝatataj de la klientoj. Por ŝanĝi tiun

fenomenon antaŭ ĉio oni devas ĝustatempe reguligi la konsiston de la produktaĵoj kaj pliprodukti la debithavajn varojn.

KION MONTRAS LA MALPLIIĜO DE LA INDUSTRIA PRODUKTADO?

Ekde la dua duonjaro de 1989 la kresko de la industria produktado de Ĉinio malrapidiĝis monaton post monato. En julio ĝi kreskis je 9.6% kompare kun tiu en la sama periodo de 1988 kaj en septembro ĝi kreskis nur je 0.9% kaj en oktobro la industria produktado havis negativan kreskon, t.e. ĝi falis je 2.1% kompare kun tiu de la sama monato de 1988. La ekonomia profito de la industrioj serioze falis. La informoj publikigitaj de la Ŝtata Statistika Buroo kaj 3 aliaj departementoj montris, ke tio montriĝas ĉefe en 4 flankoj: malrapide kreskis la produktiveco, evidente altiĝis la produktokosto, falis la interezo kaj imposto de komerco kaj tiuj de la kapitaloj. En la komenco de 1990 la industria produktado daŭre malpliigis.

Ekonomikistoj opinias, ke la supre menciitaj fenomenoj markas la efikon de la streĉo de la kredito kaj financo kaj aliaj rimedoj kaj ankaŭ spegulas la seriozan ekon-

omian situacion. La praktikado de la financ-streĉado kaj malprospero de la merkato stagnigis iujn malpez-industriajn produktaĵojn, limigis ilian produktadon kaj ankaŭ malvigligis la urbatajn kaj vilaĝajn entreprenojn. Pro malekvilibro inter agrikulturo, peza kaj malpeza industrioj en la lastaj jaroj, evidentiĝas la katenado fare de la industrioj de energio kaj krudaj materialoj al aliaj industrioj. Iuj entreprenoj ne povas fari normalan produktadon pro manko de elektro, karbo kaj materialoj.

Estas ja neignorebla la malutilo fare de la tro malrapida kresko de industrio al la nacia ekonomio. Antaŭ nelonge Wang Bingqian, ministro de financoj, diris en la kunsido de la fakuloj, ke la ŝlosilo de la ekonomia reguligo estas pliiĝo de la ekonomia efiko, kaj ĉiuj ekonomiaj branĉoj devas zorgi ne nur pri la rapideco, produktokvanto kaj produktokvalito, sed ankaŭ pri la ekonomia profito.

Ekonomikistoj opinias, ke iuj kontraŭdiroj kaj problemoj en la ekonomia vivo de Ĉinio malkaŝiĝis hodiaŭ, sed latentis antaŭ longe. Aliaj estas malfacile eviteblaj en la reordigo. La reordigo ja ne povas esti plenumata tuj, precipe en la kelkaj jaroj de la estonteco. Katenate de la fundamentaj industrioj kaj kvitigo de grandnombra ŝuldo al aliaj landoj, la ĉina registaro frontas kontraŭ pli malfacilan taskon en la venontaj jaroj, kaj oni devas fari solidajn paŝojn en la reordigo de la ekonomia strukturo, profundigo de la entreprena reformado kaj starigo de la scienca makroregula sistemo. Nia reguligo jam eniris en la ŝlosilan periodon. En la laborkunsido pri reformado de la tutlanda ekonomia sistemo okazinta antaŭ nelonge ĉefministro Li Peng diris: "Nia nacia ekonomio sane disvolviĝas. 1990 estas ŝlosila jaro de la 3-jara ekonomia reguligo. Se ni sukcesos trapasi la kurantan jaron, ni do trapasos la plej malfacilan periodon de la ekonomia reguligo." ■



En la Kunveno de Ĝeneralaj Sekretarioj de Lokaj E-Asocioj

● De la 27-a de februaro ĝis la 1-a de marto okazis en Qingdao la Kunveno de Ĝeneralaj Sekretarioj de la Lokaj E-Asocioj de Ĉinio, kiun ĉeestis 41 reprezentantoj el 29 provincoj kaj urboj. Ĝin prezidis Li Yuping, vicprezidanto de la Ĉina E-Ligo (ĈEL) kaj Liu Ling, aganta ĝenerala sekretario de ĈEL. Ĝia temo estas kiel efektiviĝi la novan politikon de E-movado, aprobitan en la Plivastigita Kunveno de la Konsilantaro de ĈEL okazigita en junio de 1988 en Pekino. Ĝi celas per Esperanto servi al la reformado, pordmalfermado, modernigo, materia kaj spirita civilizacioj de Ĉinio kaj kontribui al la amikeco inter diverslandaj popoloj kaj la paca kaj kvieta internacia medio.

En la kunveno, la Qingdao-a E-Asocio konigis la preparadon por la 5-a Pacifika E-Kongreso en 1992. La ĉeestantoj opiniis, ke oni devas plej bone prepari la kongreson por ĝia sukceso.

● Por kontentigi la bezonon de sciencistoj, teknikistoj kaj intereso de Esperanto, la Centra Televida Stacio telesendos per sia dua frekvenca kanalo la E-instruan televidfilmon "Espero" de la mezo de majo ĝis la fino de oktobro, trifoje semajne po 30 minutoj. Konforme al la programo la Centra Televida Stacio, la Qingdao-a Universitato, ĈEL kaj la redakcio de "El Popola Ĉinio" kune funkciigos la

E-instruan Televidan Kurson kaj akceptas kursanojn el la tuta lando ekde la lasta tagdeko de februaro.

La Centra Televida Stacio funkciigos la televidajn kursojn de la angla, japana, franca kaj germana lingvoj. Estas la unua fojo por ĝi funkciigi E-kurson. Ĉar en Ĉinio estas kelkcent milionoj da homoj, kiuj rigardas ĝian programon, la 6-monata E-telesendo sendube havas gravan signifon por propagandi kaj disvastigi Esperanton.

● Memore al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Norman Bethune, fama kanada brustokirurgo, kiu faris elstaran kontribuon al liberigo de la ĉina popolo, la Changshu-a Poŝtoficejo faris memoran stampilon en Esperanto kaj la ĉina lingvo kaj ekuzis ĝin de la 3-a de marto. Ĝia kreinto estas s-ro Zhang Linrui.

● Inter la 6-a kaj la 10-a de julio okazos la 26-a Brazila Kongreso de Esperanto en Salvador, la plej antikva urbo de Brazilo. LKK esperas venigi al la kongresejo pli ol 400 esperantistojn el la 25 brazilaj ŝtatoj kaj reprezentantojn de kelkaj eŭropaj kaj latina-



Memora stampo en Esperanto kaj la ĉina lingvo

merikaj landoj.

● La Esperanto-rondeto "ESPERO" ĉe la 102-a barnaŭla baza lernejo en USSR petas vin helpi en organizado de ekspozicio de infanpentraĵoj. La ekspozicion povas partopreni infanoj de la tuta mondo en la aĝo de 4 ĝis 14 jaroj. La temoj estas laŭplaĉaj. La

malfermo de la ekspozicio estas planata la 1-an de oktobro 1990, tial la limdato por alsendo estas la 1-a de septembro 1990. Adreso: E-klubo "ESPERO", A/k-2040, Barnaŭlo-60, Soveta Unio-656064.

● Okaze de Aŭstralia Esperanto-Kongreso en januaro 1990 en Melburno, fondiĝis aŭstralia junulara grupo esperantista kaj la grupo ekeldonas ĝian organon "Luka Bulteno".

● Timisoara estis centro de Esperanto-movado de Rumanio. La 7-an de januaro 1990 naskiĝis tutlanda Esperanto-asocio, laŭ iniciato de Kolektivo Esperanto kaj Interlingvistiko (KEI) de la Universitato en Timisoara.

Radio Timisoara elsendis dufoje en Esperanto kaj rumanlingve pri Esperanto. En la Universitato reaperos grandkvante elementa Esperanto-kurso. En ŝtata eldonejo de la sama urbo aperos lernolibro, vortaro (E-R) kaj studo pri la monda lingvo-problemo.

● Reeldoniĝos en Esperanto la libro "Murcia Regiono" kun belaj koloraj fotoj, kiu pritraktas geografion, turismon, historion kaj



Renkontiĝo de tri junularaj E-kluboj en KIRY

ĉiujn komunumojn de la Murcia Regiono. Oni povas peti ĝin al Grupo Esperantista, 30580 Alquerias, Murcia, Hispanio.

● La 18-21-an de januaro 1990, tri amikaj junularaj E-kluboj renkontiĝis en KIRY de Pollando. Partoprenis 18 junaj geesperantistoj el urboj Varsovio, Lodzo kaj Staszów.



Post leciono

Vizito al Qinghua-universitato

Teksto de **SUN GUOLIANG**
Fotoj de **WU LIN**

Amatoro





Pilkoludo

LA 78-jara Qinghua-universitato estas unu el la plej altaj lernejoj en Ĉinio. Ĝi sidas en nordokcidenta Pekino kaj tuŝiĝas kun la fama Yuanmingyuan-ĝardeno. La universitato havas kolegiojn de naturaj sciencoj, arkitekturo kaj ekonomia administro kaj institutojn por esplor-studentoj kaj adoltuloj, 28 fakultatojn kun 41 fakoj, 83 studobjektoj por magistrecado, 54 studobjektoj por doktoreco kaj 11 postdoktorecajn nefiksajn staciojn.

Matene mi eniris la universitaton. Regis en ĝi streĉo kaj rapida ritmo. Aro post aro da studentoj kun librosakoj rapidis al klasĉambroj, iuj el ili eĉ biciklis.

Mi venis en la ĉambron de la klaso 63 de la hidraŭlika fakultato, kiam iris leciono tie. Ĉiuj sidlokoj estis okupataj kaj regis plena bonordo en la ĉambro. Koncerna respondeculo konigis al mi, ke ĉiujfoje ĉeestas lecionon pli ol 95% de la studentoj. La instruistoj laŭdis, ke

la studentoj de tiu klaso aŭskultas lecionon atente kaj faras ekzercojn bone.

En laboratorio la studentoj de la klaso 7 de la fotoelektronika fakultato faris eksperimenton de imita cirkvito. Ili ne kontentiĝis pri nura manipulado sed anstataŭe serioze faris pluan esploron. La eksperimento daŭris 3 kaj duonan horojn, tamen multaj el ili uzis pli da tempo. Iuj el ili daŭrigis eksperimentadon vespere por akiri kontentigan rezulton.


Multaj studentoj pasigis postlecionajn horojn en legoĉambroj. Mi vidis, ke antaŭ lerneja legoĉambro estas centoj da bicikloj. Ĉie en la vasta legoĉambro lernis studentoj silente, ke mi malrapidigis miajn paŝojn.

Instruisto konigis al mi, ke antaŭ nelonge la lernejo faris enketon pri vespera memlernado inter pli ol 10 000 studentoj. La rezulto montris, ke 93% de la studentoj

partoprenis en vespera memlernado.

Qinghua-universitato turnas grandan atenton sur scienc-esploron. En la laboratorio por esplori superkonduktajn fibrojn mi informiĝis, ke la esplorantoj de la fakultatoj de elektronika inĝenierio kaj fiziko kaj tiuj de superkonduktaj fibroj de la fakultato de krud-materiala scienco bone kunlaboris kaj lastatempe akiris novan sukceson en tiu ĉi kampo. Nun ili studas pri la leĝo fabriki superkonduktajn fibrojn kaj samtempe klopodas por kiel eble plej rapide plifortigi la naturon de tiaj fibroj kaj provfari superkonduktajn aparatojn. Lastatempe, la instituto de tekniko pri nuklea energio de la lernejo konstruis nuklean malalttemperaturan reaktoron por doni varmon. Ĝi estas la unua sekura konkoforma tia reaktoro en la mondo.

En la lastaj jaroj la lernejo akiris pli ol mil scienc-esplorajn pre-



En laboratorio

miojn, inter kiuj 43 estis por ŝtataj inventoj, 9 por naturaj sciencoj kaj 50 por ŝtataj scienc-teknikaj progresoj.

En Qinghua-universitato funkcias la Centro por Direkti Postlecionajn Scienc-teknikajn kaj Produkt-praktikajn Aktivecojn de Studentoj. Ĝi instalas sparkan fonduson kaj asignas dekmil juanojn al postlecionaj scienc-teknikaj aktivecoj de studentoj. Por tiaj aktivecoj, ĉiu studento povas peti helpon de tiu fonduso. Nun 87 postlecionaj sciencaj esploroj de studentoj estas financitaj de la sparka fonduso. Ĝi instalas ankaŭ aliajn fondusojn, kio kreis bonan medion kaj necesajn ekonomiajn kondiĉojn por la postlecionaj scienc-teknikaj aktivecoj de studentoj.

En la scienc-teknika centro Sanlian mi vidis ĝeneralan direktoron Guo Liang. Li diris al mi, ke ĝi estas fondita de studentoj por viziti lernejon je la kosto de propra lukro en libertempo, kun scienc-teknika disvolvo kaj servo kiel ĉefa formo. En la pasintaj kvin jaroj ĝi disvolviĝis rapide kaj nun posedas fiksan kapitalon kun valoro de pli ol 80 000 juanoj. Ĝi havas sian ek-

sperimentan fabrikon kun fajnaj ekipaĵoj kaj avangardaj teknikoj. La celo de la centro estas direkti la aktivecojn de studentoj kaj per alt-nivela disvolvo de scienco kaj tekniko akceli malaltnivelan fizikan laboron por turni sciojn en sociajn produktajn fortojn. Multaj produktaĵoj de la centro estas bonvenaj en aliaj provincoj aŭ urboj. La softvara sistemo FD-622 kaj altdonitaj kolektilo estis eksponitaj en la foiro de Frankfurto, FR Germanio.

En la Ĉina Unua Defi-pokala Ekspozicio de Scienc-teknikaj Fruktoj de Studentoj, okazinta antaŭ nelonge, la eksponaĵoj de studentoj de Qinghua-universitato gajnis 3 el la 6 unuaj premioj, 4 duajn premiojn, 4 triajn premiojn kaj 3 kvarajn premiojn, kaj la nombro de premioj estis la plej granda inter ĉiuj partoprenantoj.

En la tempo de postlecionaj aktivecoj de la studentoj mi suriris la spektejon de la stadiono. Mi unufoje vidis la scenon, ke 50-60 piedpilkoj ruliĝas sur la ludejo. Sur la kurejo aro post aro da studentoj sin ekzercis per mallong- kaj longdistanca kuroj, hurdokurado k.a.

Ankaŭ sur la tenisa kaj korbopilka ludejoj iris intensa sportado.

En Qinghua-universitato estas teamoj pri atletiko, piedpilko, korbopilko, flugpilko, tablotenis, naĝo, vejcio, ĉina ŝako k.a., kiuj atingis bonan sukceson en konkursoj. Studentino de la kemia fakultato kreis azian rekordon de 1 500-metra kuro. En la 7-a Konkurso de "Atletika Pokalo" de Pekinaj Altlernejoj okazigita antaŭ nelonge, la vira kaj virina teamoj de la lernejo okupis la duan lokon respektive. En la lernejo ĉiujare okazas sportaj konkursoj kaj doniĝas la premio de pokalo de Ma Yuehan, elstara sporta profesoro.

Semajnofino eble estas la plej ĝojiga tempo por la studentoj. Je la 7-a vespere mi eniris balejon. En bela melodio paro post paro da gestudentoj plezure dancis valson. Iu bela studentino kun rideto petis min danci kun ŝi. Ŝi diris al mi, ke por riĉigi la postlecionan vivon de la studentoj, la lernejo organizis orkestron, trupojn pri dramo kaj danco kaj societojn pri poezio kaj literaturo. La lernejo ofte invitas la Centran Filharmonion kaj aliajn prezenti por la studentoj.

Ŝi diris al mi ankaŭ, ke dekoj da studentoj de la klaso 82 de la mediprotekta fakultato antaŭe scipovis kanti nur kelkajn kantojn en amuzkunveno kaj, ilia postleciona vivo estis seka. Tial, la lernejo donis al ili dancartan lecionon, kio multe interesis la studentojn de tiu klaso. Post unu semestro ili ĉiuj povis danci mazurkon, mongolan dancon, valson k.a. En la arta konkurso okazinta en la lernejo la klaso gajnis duan premion de valso.

"Jen studentoj de la klaso 82 de la medioprotekta fakultato!"

Rigardante en la direkto montrita de ŝi, mi vidis, ke paro da gestudentoj lerte dancas. Mi demandis ŝin: "Tre lerte vi dancas, ĉu ankaŭ vi estas studentino de tiu klaso?"

"Konjektu!" ŝi ŝerce palpebrumis.




Provo de nova aparato en lerneja radiostacio




Korpokultura leciono


Alilanda instruistino donas lecionon.

En legoĉambro





Doktorino Ni Yixin kaj studentoj



Kubo, gastiganto de la 75-a UK

DE la 14-a ĝis la 21-a de julio 1990 okazos la 75-a Universala Kongreso de Esperanto en Havano, la ĉefurbo de Kubo. Kaj krome, la 46-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos en Playa Giron de Kubo de la 21-a ĝis la 28-a de julio 1990.

La Kuba Respubliko, nordokcidente de la Kariba Maro, kun areo de 114 500 kvadrataj kilometroj, estas la plej granda insula lando en la Okcidentaj Indioj. Ĝi konsistas el la Insulo de Kubo, Insulo de Pinos kaj aliaj pli ol 1 600 insuloj. Ĝi havas 10 milionojn da loĝantoj, el kiuj plimulto estas blankuloj kaj parto nigruloj. Ili parolas la hispanan lingvon kiel sian nacian lingvon.

Jam en 1492, kiam Kolumbo atingis unuafoje la novan kontinenton, li malkovris Kubon. En la unuaj jaroj de la 16-a jarcento la hispanoj konkeris la landon, kiun ili poste prenis kiel la bazon por ekspansi al Meksikio kaj Mezameriko. De 1868 ĝis 1878 la kuba popolo brave batalis kontraŭ la kruela koloniisma regado de Hispanio, sed estis subpremiita de la regantoj. En 1895 eksplodis la dua naci-liberiga milito, kiun gvidis José Martí, fama nacia heroo de Kubo. En la 20-a de majo 1902 fondiĝis la Kuba Respubliko.

Plejparto el la Insulo de Kubo estas ebenaĵo, kun pluvarbara klimato. Kubo abundas je mineralaj riĉfontoj kaj ĉarmas per naturaj belaĵoj.

Havano kun du milionoj da


loĝantoj estas la centro de politiko, ekonomio, kulturo kaj trafiko de Kubo. Ĝi fondiĝis en 1515. La kuba popolo tre atentigas protekton de la historiaj kulturaj restaĵoj. Por ne damaĝi ĝian originalan aspekton kaj samtempe favori ĝian disvolviĝon, oni aranĝis ĝian konstruadon por du partoj, nome la malnova Havano kaj la nova Havano. Pro tio nun ankoraŭ vidiĝas la restaĵoj de ĝiaj malnovaj muroj, mallarĝaj stratetoj, preĝejoj konstruitaj en la tempo de la koloniisma regado, muzeoj kaj antikvaj kasteloj. Havano estas fama bona haveno de la Okcidentaj Indioj, en kiu oni povas ankri grandajn oceanŝipojn. Pli ol duono de la importaĵoj de Kubo transportiĝas de tie. En la urbo troviĝas granda bronza statuo de José Martí. En la antaŭurbo estas la Flughaveno José Martí.

La kuba Esperantomovado revigliĝis en 1979. En 1983 la Kuba Esperanto-

Asocio membriĝis al UEA. En la lastaj jaroj la kuba E-movado multe disvolviĝis. Aŭguste de 1989 komenciĝis la Esperanta disaŭdigo de Kubo.

Kiel informite, nun estas preskaŭ plenumitaj la preparlaboroj, kiujn la kubaj esperantistoj faris por sukcese okazigi la 75-an UK kaj la 46-an IJK. La gastama kaj fervora kuba popolo atendas la diverslandajn esperantistojn, kiuj partoprenos la kongresojn! ■

Monumento al José Martí en Havano



Pri Rememoro pri la Sudo

de DI ZI

*La sudo ĉarme belas,
antaŭe ĝin jam konis mia koro.
Je sunleviĝo ĉe l' rivero flame ruĝas floroj,
printempe verdas la rivero en safirkoloro.
Ĉu eblas ĝin forviŝi el memoro?*

Bai Juyi (Baj Ĝjuji) (772-846 p.K.) estis granda realisma poeto en Tang-dinastio. Li iam estis oficisto en la suda Ĉinio. La poemo estis verkita ĉe lia rememoro pri la bela suda lando (ĉi tie “la suda lando” signifas partojn de la provincoj Jiangsu kaj Zhejiang).


La verko estis farita en formo de ci-o. Ci-o originas el kantoteksto. Iom post iom ĝi apartiĝis de muziko kaj fariĝis unu el la literaturaj formoj. Tial ĉiu verko en formo de ci-o adaptiĝas al difinita melodio, kiu havas sian propran nomon. Ĝenerale la verkoj en formo de ci-o havas sian propran titolon kaj melodian nomon. “Rememoro pri la Sudo” estas kaj la titolo kaj la melodiana nomo de la poemo.


“Rememoro pri la Sudo” vivece prezentas al ni la printempan pejzaĝon de la sudo de Ĉinio. *Je sunleviĝo ĉe l' rivero flame ruĝas floroj, printempe verdas la rivero en safirkoloro* — du famaj versoj, kiuj ĉiam ravas la legantojn, skizas tian scenon: Matene, sub la lante leviganta suno la akvo de rivero ruĝe brilas kaj ankaŭ ruĝigas la florojn ĉe la bordoj de la rivero, dum la printempa akvo estas tiel pura kiel safiro. Kia agraba pejzaĝo! Kiel oni povas ne rememori la vidaĵojn! La poeto kaptis la apartan koloran trajton de printempo kaj tuĉis ĝin, donante profundan impreson. Samtempe li ankaŭ esprimis sian profundan amon al la sudo.

La pentraĵo estas verkita de s-ro Chen Xiwei (Ĉen Ŝjiŭej). En la pentraĵo la aŭtoro uzas la nigran koloron kiel la ĉefan kaj samtempe tuĉas per la ruĝa, verda, blua koloroj por krei frapantan kontraston. La pentristo sukcese reaperigis la senton de la poeto en la verko.

S-ino Shen Huiqi (Ŝen Hujĉji) lertas en kaligrafado de stelea stilo de Wei-dinastioj. En la kaligrafado ŝi reaperigis la etoson de la verko. ■

Kaligrafado de Shen Huiqi





Pentrajo farita de Chen Xiwei por la poemo

憶江南

庚午年春

黃斗石寫



Specifa Terapio kontraŭ Vaskularito

de SUN GUOLIANG kaj FU CHANGLUN

VASKULARITO estas obstrukca tromboangiito kaj internacie oni nomas ĝin Buerger-malsano. La malsanulo havas palajn kaj malvarmajn membrojn en la komenca stadio, en la meza stadio la membroj fariĝas ruĝaj kaj nesensivaj kaj en la lasta stadio ili ulceriĝas kaj nekroziĝas. La doloro estas neelportebla kaj la malsano povas kaŭzi sepsemion. Nun en Ĉinio estas ĉ. 300 000-500 000 suferantoj de tiu malsano kaj en la mondo 1.5-2.5 milionoj. Longtempe ĝi estas rigardata kiel malfacile kuracebla malsano, ĝenerale, oni amputas plejparton de la pacientoj kiel kutime. Sed tio ne povas radikale kuraci la malsanon. La mortokvanto de la suferantoj estas tre granda, tial oni nomas la malsanon duagrada kancero.

Nun Ĉinio trovis specifan terapion por kuraci tiun malfacile kuraceblan malsanon. Oni aplikas jon-enkondukan aparaton, pilolojn Maidong kaj Tehao kaj pocion Yihao por kuraci vaskulariton, kun kombino de ĉina kaj okcidenta medicinoj. Antaŭ ne longe ni venis al la vaskularita hospitalo en la antaŭurbo de Jining, Shandong-provinco, kaj vizitis kuraciston Zhang Xinghui, kreinton de la nova terapio kontraŭ vaskularito.

La 51-jara Zhang estas malkaŝema kaj honesta. Li havas nur elementan klarecon, sed li kun miriga energio memlernis la "Patologion", "Anatomion", "Skizon

de Tradicia Ĉina Medicino", "Huangdi Nei Jing" kaj multajn aliajn medicinajn verkojn. Antaŭ 20 jaroj li komencis studi la novan terapion. La projekto pri ĝi formiĝis ĝuste sub la sugesto de la "Anatomio" de I. P. Pavlov.

Zhang diris: "La ulcero, nekrozo kaj doloro de la manoj kaj piedoj de la vaskularita suferanto estas nur simptomoj, la baza kaŭzo estas, ke trombo okazas en la arterietoj de la membroj. Trombo estas estigita pro la perturbo de angio-superrega funkcio de nerva sistemo, precipe de lumba simpato. Por radikale kuraci la malsanon, oni devas revigligi la angio-superregan funkcion de la simpato. La tradicia membro-amputa kuraco ne povas nuligi la kaŭzon de trombozo, tial ĝi ne povas radikale kuraci la malsanon." Por atingi la celon li aplikas novan terapion kun kombino de ĉina kaj okcidenta medicinoj.

En malsanulejo ni vidis kuracistinon ŝpruci flavan pocion al ulcera piedo de paciento. Ŝi diris al ni, ke la pocio estas nomata Yihao. La novaj enhospitaliĝintoj, ĝenerale, suferas ulceron kaj pusadon ĉe la membroj, en kiuj iam vivas larvoj, kaj la doloro estas neelportebla. La pocio povas forigi inflamon kaj doloron, mortigi bakteriojn, kvietigi doloron kaj akceli la forigon de ulcero. Tre seriozaj pacientoj povas preni ankaŭ la pilolon Tehao. Antaŭe la hospitaloj ĝenerale donis la medikamenton Dulingding malutilan al la homa korpo



Zhang Xinghui (meze) en kuracado

por forigi doloron.

La paciento nomiĝas Fu Pengzhi kaj venis de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Li diris: "La suferantoj de vaskularito neniel povas elteni la doloron, multaj eĉ intencas sin mortigi pro la doloro. Oni ne plu sentas doloron post 6-10-taga kuracado per la pilolo Tehao kaj pocio Yihao." Ni demandis pli ol 10 pacientojn, ili ĉiuj laŭdis la pilolon kaj pocion.

Kuracisto Zhang diris, ke nur kiam la pacientoj povas manĝi kaj dormi post forigo de la doloro, oni povas radikale kuraci ili la malsanon. Troviĝas du rimedoj radikale kuraci la malsanon: Unu estas fari korpopunktan kuracadon per jon-enkonduka aparato kaj, la alia estas doni al paciento la pilolon

Maidong. La rimedoj ludas gravan rolon en varmigo kaj vigligo de ĝinglŭo-oj, reduktado de sango-denseco, solvado de trombo, faciligo de sanga cirkulado kaj reguligo de angio-superrega funkcio de la vegetala nerva sistemo.

En la hospitalo ni vizitis ankaŭ la pacientojn Zhai Huaming el Ningxia, Duo Baoguo el Tianjin, Liu Yufan el Heilongjiang kaj aliajn. Ili suferis de malsano 7-10 jarojn kaj ne ricevis bonan efikon post kuracado en pluraj hospitaloj. Post diagnozo iliaj membroj devis esti amputitaj. Ricevinte unujaran kuracadon per la nova terapio, ili resaniĝis kaj la membroj estas ne amputitaj.

La nova terapio havas kvar avantaĝojn: A. Granda procentaĵo de resanigitoj. Nun la plej alta procentaĵo en kaj eksterlande tiuflanke estas ĉ. 60%, sed tiu por la nova terapio atingis 93% kaj la kuracefiko 100%. B. Ne necesas amputo. El la pli ol 500 malsanuloj kuracitaj per la nova terapio neniu ricevis amputon, krom tiuj amputitaj antaŭ la enhospitaliĝo. C. Mallonga seanco kaj malmulta pago. Vaskularito estas grava kronika malsano, la tradicia terapio, ĝenerale, bezonas plurajn kaj eĉ pli ol dek jarojn, sed la nova nur 1-3 jarojn, kaj la pago egalas al kvarono de tiu por la tradicia. Ĉ. Ne okazas recidivo. El la pli ol 200 elhospitaliĝintoj estas neniu recidivulo.

Ni vizitis ĉ. 20 elhospitaliĝintojn. Xu Qingxian (Ŝju Ĉingŝjan), kamparano de Jiaxiang (Ĝjaŝjang)-gubernio, Shandong-provinco, diris, ke li eksuferis vaskulariton en 1963, liaj manoj kaj piedoj ulceriĝis grave kaj doloris al li fortege. Li vizitis multajn hospitalojn, sed ne ricevis kuracefikon. Nemalmultaj kuracistoj proponis, ke li kiel eble plej frue ricevu amputon. En 1966 li en malespero ricevis kuracadon de Zhang Xinghui. Post unuse-

majna kuracado ĉesis la doloro kaj malgrandiĝis la ulcera amplekso. Post unujara kuracado li elhospitaliĝis kaj lia vaskularito ripetiĝis neniam en la pasintaj 22 jaroj.

Gao Chongshan estis tinkturisto de la urbo Jinan. Liaj gamboj estas amputitaj kaj liaj fingroj kriplaj. Li ĝoje diris al ni: "Mi ŝuldas al Zhang mian vivon." Post kiam li eksuferis la malsanon en 1969, plurfoja kuracado ne helpis lin kaj anstataŭe seri- oziĝis lia vaskularito. Liaj gamboj estis amputitaj 4-foje. Post tio ulceriĝis liaj ses fingroj kaj amputita dekstra gambo-radiko kun areo de 30 cm x 25 cm. Oni devis apliki grandan kvanton da medikamento por forigi lian doloron. Januare de 1985 li suferis febron de pli ol 39°C, poste lin trafis sepsmio. Je la 23-a de januaro li estis portita al Zhang Xinghui por ricevi kuracadon per la nova terapio. Post nur 10 tagoj normaliĝis lia korpa temperaturo, malaperis la inflamo kaj ĉesis la doloro. Post tri monatoj malgrandiĝis la ulcera amplekso je kvarono kaj li elhospitaliĝis post du jaroj. Li diris, ke Zhang ne nur kuracis lian malsa-

non, sed ankaŭ svatis al li bonkoran virinon. Nun ili havas amin- dan filineton.

Ke kuracisto Zhang Xinghui sukcesis en kuracado de vaskularito, tio ĝojigis la suferantojn de la malsano. Nun pacientoj el 24 provincoj kaj municipoj de Ĉinio estas kuracataj de li. Ankaŭ malsanuloj de Francio, Kanado kaj Britio sendis leterojn al li por peti kuracon. Por havigi oportunecon al malsanuloj li starigis filiojn de la hospitalo en Pekino, Jinan, Qingdao kaj Weihai. En la lastatempe okazigita kunveno de fakuloj la nova terapio de Zhang estis aprobita kaj alte taksita de la ĉeestantoj. Krome, Zhang akiris sian sukceson ankaŭ en kuracado de osta tuberkulozo, medolito, neŭrito kaj malignaj ulceroj. Li resanigis 30 malsanulojn de osta tuberkulozo, 40 de medolito, 80 de neŭrito kaj milojn da suferantoj de maligna ulcero.

Kiam ni adiaŭis Zhang, li diris al ni: "Mi esperas, ke mia nova terapio por kuraci vaskulariton servos al pli multaj malsanuloj de la mondo en la estonteco." ■

Horaro de la ĉiutaga Esperanta disaŭdigo de Radio Pekino

UTC	Al regionoj	Ondoj (m)	KHz
20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
		31.5	9500
		30.1	9965
22:30-23:00	Latin-Ameriko	31.6	9480
		26	11515
11:00-11:30	Japanio, Koreio	31.6	9480
		43.1	6955
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.7	11650
		19.7	15165

Ŝtonpordoj sur la vojo Wuchidao

Teksto de XU YE kaj WANG QINGHUA


Fotoj de XU JINYAN

Aŭtovojo kaj la antikva vojo Wuchidao






Ĉe la piedo de Wumeng-monto



Ŝtona ponto sur la antikva vojo



TRAPASINTE la riveron Jinsha, ni suriris montvojon sur altebenaĵo. Ĝi estas la plej danĝera sekcio de la vojo Wuchidao. La kornica vojo, plejparte larĝa ĉ. 1.6 m., kunligas la ĉielon kaj monton, sub ĝi torentas la rivero. La vojo Wuchidao zigzagas inter krutaj montaroj kaj danĝeraj montpasejoj. En multaj partoj de la vojo kuŝas rokoj, kiel ŝtonpordoj, kaj survoje de tempo al tempo vidiĝas tiel nomataj ŝtonpordaj pasejoj.

ŜTONPORDA PASEJO DE GAOXIAN-GUBERNIO

La nomita pasejo, 40 km. sude de Yibin, estas la unua ŝtonpordo de la vojo, kaj ankaŭ estis la unua pasejo de Sichuan al Yunnan kaj Guizhou en la periodo de Qing-dinastioj (221 a.K.-1911 p.K.).

Ni veturis per aŭto laŭ Nanguang-rivero. Sen gvido de lokanoj estus malfacile rimarki, ke ni jam atingis la ŝtonpordan pasejon. Pasintece, tie ne mankis apikaj rokegoj, kiuj kuŝis unuj sur aliaj kaj baris la vojon de sude norden. Nun, eksplodiginte la rokojn, oni konstruis tie larĝan ŝoseon kaj ne plu veturas laŭ la rivero. La danĝera kornica vojo

fariĝis ebena ŝoseo, kaj malaperis la antaŭa apika ŝtonporda pasejo. Antaŭ la rokoj vidiĝas la postsignoj de hakado de la ŝtonporda pasejo. Ĉeriveraj rokmuroj surhavas nemalmultajn gravuritajn surskribojn kaj statuojn kultatajn de lokanoj eĉ hodiaŭ. Jen surskribo sur rokmuro: "La ŝtonporda pasejo sude de Yibin staras kiel polekso de giganta primato. Antaŭ ĝi montoj ondas, kaj malantaŭ ĝi riveroj torentas. Danĝeraj vojoj de la okcidenta Shu famas sub la ĉielo, kaj nenio simila ekzistas aliloke." La surskribo montras la danĝerecon de la tiama pasejo. Tamen, en la antikveco la ŝtonporda pasejo de Gaoxian-gubernio ne estis pli ol malgranda inter la sennombraj pasejoj sur la vojo Wuchidao.

El la ŝtonporda pasejo de Gaoxian-gubernio la ŝoseo iras suden laŭ Nanguang-rivero. Nun tie ofte kontaktiĝas loĝantoj ĉe la limo inter la provincoj Sichuan kaj Yunnan. En foiro regis vigla komercado, oni bruis antaŭ budoj. Maljunulinoj, kun la kapo envolvita per blanka tolo, portis bluan veston, iuj el ili kun harplektaĵoj. Ili kun dorsokorboj iris tien kaj reen por vendi montproduktaĵojn. Vendinte ilin, la maljunulinoj aĉetis ĉiutagajn bezona-

ĵojn. Estis malfacile distingi inter ili, kiuj estas sichuan-anoj kaj kiuj yunnan-anoj. Kornicaj vojoj kaj danĝeraj pasejoj ne povas malhelpi la kontaktigon inter la popoloj, riveroj kaj montoj interkomunikiĝas per ŝoseo, izolita medio donas al la popoloj la karakteron malŝati solecon, kaj la kontakto en tiu loko montriĝas aparte libera.


LA MONTURBO YANJIN

Yanjin, situanta sur deklivo norde de la altebenaĵo en nordorienta Yunnan kaj trafluata de Guanhe-rivero, estas gubernio kun krutaj montoj. La gubernia urbo de Yanjin sin trovas ambaŭborde de Guanhe-rivero. La loĝantoj vivas en domoj sur rokmuroj. La loĝdomo kun groto kiel ĉambro havas enirejon ĉe unu flanko de monto kaj elirejon ĉe la alia, kiu rigardas al la rivero, kun pendanta ligna turo. Pasintece oni devis starigi poŝtstaciojn en izolitaj lokoj. Neatendite, tiuj poŝtstacioj fariĝis bazaroj kaj urbetoj post multaj jaroj.

Sur la montodeklivo en la orienta parto de la gubernia urbo, kie vivas indiĝenoj, ni trovis kvadratan limŝtonon. Sur ĝia flanko gravuriĝas la ideogramoj kun la senco: La antikva vojo ĉe la ŝtonpordo kondukas al Nanzhao. La lokanoj nomas ĝin limŝtono de la vojo Wuchidao, ĉar siatempe ĝi trapasis la lokon. Nun lokiĝas loĝdomoj ĉirkaŭ la limŝtono, kiu plejparte estas ŝirmita de muro kaj servas kiel limo inter loĝdomoj.

Ĉie en la urbo dissemiĝas ŝtonoj. Kie kreskas grenplantaĵoj? Kun tia dubo ni surgrimpis Yidumonton laŭ longa ŝtonŝtuparo ĉe ŝoseo proksime de la urbo. Antaŭ niaj okuloj aperis akvolanda pejzaĝo: Sur la teraskampo kreskas juna tritiko, disvolviĝas kolzofloroj, pizfloroj kaj fabfloroj. Nature, nia dubo malaperis antaŭ la sceno.

Ni vidis la tombon de Abiao,



reĝo de Wumeng de Song-dinastio (960-1279), ombratan de palmoj kaj bambuoj. Fakte, ĝi estas malgranda monteto. Ĉirkaŭ ĝi staras 8 ŝtonaj ŝafoj, leonoj kaj ĉevaloj kaj unu steleo sen surskribo. Tiuj objektoj povas esti rigardataj kiel atestoj de la antikva Yidu-monto. Laŭdire, la antikva Yidu-monto estis ĉefa loĝloko de ji-oj. Tiam oni konstruis okangulajn loĝdomojn, kiuj rigardis al okcidento. Nun sur la monto loĝas pli ol 700 familioj. Plejparto de la loĝantoj estas han-oj kaj la resto — ji-oj. Ili ĉiuj parolas han-lingve, kun peza sichuan-tono. Malsuprenirante, ni vizitis iun familion. La gastama mastro regalis nin per sukerakvo kun poĉitaj ovoĵoj kaj montris al ni kalendaron ksilografitan de sichuan-anoj, kiu enhavas, krom dividoj de la jaro, ankaŭ pli da aŭguroj pri la agrikulturaj laboroj kaj ĉiutaga vivo. La gastiganto diris, ke ili okupiĝas pri la edzinigo de sia unua filino kaj elektas bonaŭguran daton por tio. Jen kial gluiĝis diversaj versduoj kaj oferaĵoj paperpecoj sur la muroj de la halo, sub kiuj estis metitaj freŝaj rizgrajnoj kiel oferaĵo. La vilaĝo ĉirkaŭita de la monto estas fremda por ni. Oni tie vivas kaj diligente laboras generacion post generacio. En iliaj okuloj Yidu-monto ŝajnas la tuta mondo. Ili vivas simplan kaj modestan vivon. Ĉe la malsuprenirado, ni dronis en rememoro pri la atmosfero antikveca kaj sovaĝeca sur la monto.

LA ŜTONPORDA PASEJO DOUSHA

Veturinte suden 20 km. de la gubernia urbo Yanjin, ni rimarkis la nomitan pasejon. En Duosha staras du montoj, unu kontraŭ la alia, kaj meze de ili torentas Guanhe-rivero. Antikva loka kroniko diras: “La orienta rokmuro altas je kelkmil metroj, sub la muro torentas la rivero Shushicentojn da metroj sub la tersurfaco, aŭdiĝas nur fluado, kaj neniu povas atingi ĝin. La okciden-

ta rokmuro surhavas kornican vojon, larĝan je unu paŝo kaj longan je 15 km.” La pasejo estis multfoje rekonstruita en la dinastioj Qin kaj Han (221 a. K.-220 p.K.), Sui kaj Tang (581-907), kaj la kornica vojo ĉiam bone funkciis.

Ni surgrimpis la pasejon laŭ la antikva vojo kaj rigardis ĝiajn historiajn restaĵojn. Nin kortuŝis la kreivo de la antikvuloj. Sur la pasejo estas du konstruaĵoj faritaj de posteuloj, inter kiuj estas pli ol-300-metra ŝtonŝtuparo glatiĝinta pro tretado. Videblas sur ĝi kelke da profundaj hufosignoj kaj sur la rokmuro gravuriĝas “La unua pasejo de suda Yunnan”, “Estu benata la popolo” k. a. Ĉe la suda fino de la ŝtonŝtuparo staras turo de la pasejo, super kies ronda pordo estas etaĝdomo kaj fortikaĵo. Ĉe la norda fino estas kiosko, kie konserviĝas steleo kun surskribo gravurita de Yuan Zi, kortegano de Tang-dinastio, en 794, kiam regis imperiestro Dezong. Post la finiĝo de Tianbao-batalo inter Tang-dinastio kaj la sudokcidenta reĝimo Nanzhao, ambaŭ flankoj emis paciĝi, ĵurante, ke ili gardos sian propran limon kaj tenos amikajn rilatojn. La kortego de Tang-dinastio direktis grandan atenton al la afero kaj nomumis Yi Muxun reĝo de Nanzhao. Tamen kortegano de Tang-dinastio devis persone ĉeesti la ceremonion por publikigi la edikton. Post la finiĝo de la batalo, la korteganoj timis iri al la izolita loko. Tiam kortegano Yuan Zi sin proponis por plenumi la taskon. Kortuŝite, imperiestro

Dezong promociis lin. Yuan Zi kaj liaj akompanantoj ekiris de la ĉefurbo Chang'an, iom ripozis en Chengdu kaj eniris Yunnan laŭ la vojo Wuchidao. Atinginte la ŝtonpordan pasejon Dousha, la pordon de Nanzhao, ili vidis apikan kornican vojon kaj krutajn rokojn, opiniante la vojon plej malfacile irebla en la vojaĝo. Por memoro li gravuris surskribon sur rokmuro. Trapasinte la pasejon, Yuan Zi atingis la sidejon de Nanzhao kaj estis varme bonvenigata de la tuta urbo. 12 bele ornamitaj elefantoj iris antaŭe kaj post ili sekvis la familianoj de la reĝo kun hakiloj en la mano ambaŭflanke de la strato, kaj Yi Muxun, portante fajnan tigrofelon sur si, eliris lin bonvenigi. Aperis soleno neniam okazinta sur la antikva vojo.

Nun, multe da kaligrafiaĵoj sur la rokmuro jam defalis. Kiel grava historia objekto sur la vojo Wuchidao, ĝi estas bone konservata. La vojaĝantoj neniel forlasas la ŝancon rigardi ĝin tra pordofendo kaj inspiriĝas de la historia okazintaĵo. ■

Ŝtonporda pasejo





Ĉe strato en la urbeto

La tombo de la reĝo de
Wumeng

La monturbo Yanjin



Jia Yucun Reakiris la Oficon per Kaĵola Parencigo Lin Daiyu Adiaŭis Sian Patron por Veturi al l' Avino

(La tria ĉapitro el la romano "Songô en la Ruĝa Buduaro")

(Daŭrigo)

SERVISTINO venis anonci, ke la vespera manĝo jam pretas en la apartamento de l' Avino.

Matrono Wang tuj leviĝis kaj eliris kun Daiyu tra la malantaŭa pordo. Laŭ la koridoro ili iris okcidenten, tra flanka pordo kaj atingis pavimitan vojon, kiu kondukis de sude norden kaj direktiĝis al la ĉefa domo. En la sudo flankis tri ĉambroj kaj en la nordo gigantis blanke lakita ekrana muro, malantaŭ kiu faŭkis mezgranda pordo de eta apartamento.

"Jen la loĝejo de via kuzino Xifeng," montris Matrono Wang. "Sciigu ŝin, se io al vi mankos."

Ambaŭflanke de l' pordo sin plantis kelkaj gardoknaboj. Matrono Wang kondukis la nevinon tra enira halo en la postkorton de l' Avino. Ili enĉambriĝis tra la malantaŭa pordo. Ene jam multaj homoj servopretaj. Vidinte ilin, ĉiuj ekviglis por primeti tablon. Li Wan, bofilino de Matrono Wang, alportis bovlojn. Xifeng dismetis manĝbastonetojn. Matrono Wang surtabligis supon. La Avino okupis sola la sidlokon sur litbenko norde de l' tablo. Ambaŭflanke vakis po du seĝoj. Xifeng prenis la manon de Daiyu, ke ŝi sidu sur la unua de l' maldekstraj seĝoj, sed tiu ĉi lasta sin detenis.

La Avino kun rideto diris:

"Viaj onklino kaj bofratinoj prenas la manĝon ne ĉi tie. Cetere, hodiaŭ vi estas gasto. Sidu do tie!"

Daiyu danke obeis. La Avino ordonis Matronon Wang sidiĝi. La tri kuzinoj permesite eksidis — Yingchun sur la unua dekstre kaj Xichun sur la dua; Tanchun sur la dua maldekstre. Servistinoj staris flanke, kun senpolvigilo, gargarujo kaj tuko. Li Wan kaj Xifeng servis ĉetable.

En la ekstera ĉambro svarmis la virinoj junaj kaj maljunaj, pretaj je servado, tamen tiom silente, ke eĉ tuseteto ne aŭdiĝis.

Ĉiu havis servistinon tenanteon sur pleto. Foje la patro de Daiyu admonis, ke ŝi ĉiam gardu sin kontraŭ malmodero kaj damaĝo de sia korpo; ke ŝi ne tuj prenu teon post manĝo, por ne difekti la stomakon. Sed ĉi tie, vidinte tute malsama la kutimon, ŝi sin akomodis al la nova situacio. Ŝi do akceptis la teon. Poste oni etendis gargarujon. Ankaŭ ŝi tralavis la buŝon. Post kiam ĉiuj lavis la manojn, alvenis teo trinkota.

"Vi povas foriri," diris la Avino. "Mi volas babili kun miaj nepinoj."

Matrono Wang leviĝis kaj, dirinte kelkajn vortojn, eliris, sekrate de Li Wan kaj Xifeng.

La Avino demandis Daiyu,

kion ŝi legis.

"Nur la Kvar Librojn¹." Respondinte, ŝi demandis, kion la kuzinoj legas.

"Kion?" diris la Avino. "Ili konsilas nur kelkajn ideogramojn."

Aŭdiĝis paŝbruo ekstere. Servistino anoncis, ke Baoyu venas.

Daiyu sin demandis: "Kia ŝtipa folulo ĉi tiu Baoyu?"

Jen sinjorido, kies hararo tufis en ora krono inkrustita per juveloj kaj frunto brilis per ora diademo super la brovoj, formita el du drakoj luktaj por perlo. Ruĝis lia arkista jako kun papilioj kaj floroj broditaj per oraj kaj arĝentaj fadenoj kaj sin striktigis per palaca zono kun koloraj kvastoj kaj bantoj, kiu vidiĝas el sub franĝita mantelo, el grizblua japana sateno, vervanta per ok bukedoj da broditaj floroj. Sube paradis paro da kortegaj botetoj el nigra atlaso, kun blankaj plandumoj.

la vizaĝo helis kiel aŭtunmeza luno

kun koloro de printempa floro en aŭroro

tempiharoj kvazaŭ grifelitaj brovoj ŝajne tuĉe desegnitaj vangoj kiel persikaj petaloj kaj okuloj lumaj je aŭtuna surfo

Eĉ en kolero li ŝajnis rideti kaj lia

severa rigardo varmis. Ĉirkaŭ la kolo drakis ora koliero kiu tenis per kvinkolora silka saltiero belegan jadon.

Lia tuto forte surprizis Daiyu, kies koro kriis:

“Ho, strange! Li, tiom konata, kvazaŭ mi jam vidus lin ie.”

Baoyu duongenie salutis la Avinon. Ŝi ordonis:

“Iru saluti vian panjon kaj tuj revenu!”

Post momento li revenis, jam kun alia aspekto. Plektoj el kurtaj haroj, ligitaj per ruĝa silko, sin ŝovis al la verto en dikan ŝpinaĵon brile nigran. De supre sobis kvar grandaj perloj kaj ĉe la plektaĵa pinto kroĉiĝis oraj pendaĵoj inkrustitaj per fajnaj gemoj. Li surhavis puncan palton, apenaŭ novan, sed plenan de broditaj floroj, portis kolieron, jadan, oran serurforman amuleton kun lia budais-

ma nomo kaj talismanon. Sube vidigis partoj de smeraldaj krurumoj el flora sateno; nigraj, orlitaj ŝtrumpoj kaj vermilionaj ŝuoj kun dikaj plandumoj.

*lia vizaĝo rava kvazaŭ pudrita
la lipoj ruĝe ruĝaj
la rigardo de esprimoj plenaj
kaj paroloj ĉiam ridetaj
sur la brovoj — jen natura
ĉarmo*

*ĉe l' okuloj — jen sentuma
varmo*

Superba la aspekto, sed malfacile penetri en la internon. Nu, oni verkis du ci-ojn laŭ la melodio ŝjiĝjangjue. La versoj trafis ĝuste lin.

*Senkaŭze lin ĉasadas tristo kaj
melankoli’;*

lin trafas jen deliro, jen frenezo.

En lia koro nur defi’ kaj ribele-

mo regas,

kvankam ja delikatas lia fizionomi’.

Li tute ne komprenas devon pro la bohemi’;

la librojn li ne legas pro la obstina malpi’.

Ekstravaganca, fola kaj aŭdaca li sin montras,

ignoras al riproĉo, skoldo kaj eĉ kalumni’.

Li prenas riĉon, nobelecon tute por neni’,

sed ne eltenas baton de mizera malorgi’.

La ora tempo kaj kapablo lia vane pasas;

li kaŭzas malesperon al la hejmo kaj patri’.

Jen la unua sentaŭgulo en nuna soci’;

Jam ne estas simila de l’ prahistori’.

Ho, junaj dandoj, sinjoridoj, averton aŭskultu:

Lin ne imitu; vin detenu de la perversi’!

Kun rideto la Avino milde diris: “Kial vi jam ŝanĝis la vestojn, antaŭ ol saluti nian gastinon? Nu!”

Baoyu jam rimarkis la sveltan knabinon kaj divenis, ke ŝi certe estas filino de la onklino. Li sin klinis kun saluto al ŝi. Sidiginte, li atente rigardis ŝin kaj trovis ŝian apartecon disde aliaj knabinoj:

la brovoj bistras sin kuntiras kaj ne sulkas

l’ okuloj amoplenaj ĝojas kaj neĝojas

jen ĉarmo sur la tristaj vangoj


jen lindo el la febla korpo

pupiloj larmaj glimas kaj spir’ fragila softas

riproze ŝi aspektas bela kiel flor’ en akvo

moviĝe ŝi jam ŝajnas salikvergo en zefiro

ŝi ol Bi Gan² pli saĝas kaj ol Xi Shi³ pli plaĉas



Li eksplodis per rido post la observado.

“La kuzinon mi konas,” li kriis.

Ankaŭ la Avino ekridis, aŭdinte tion. “Denove deliraĵo! Kiel vi povas ŝin vidi?”

“Ŝi, kvankam ne vidita, ŝajnas konata por mi. Mi do prenu ŝin kiel malnovan amikino kaj nun ni revidiĝis kvazaŭ post longa disigo, ĉu ne bone?”

“Bone, bone!” La Avino ridis. “Tre bone, ke vi jam povas esti tiom intimaj.”

Baoyu proksimiĝis al Daiyu kaj sidiĝis ĉe ŝi. Li ankoraŭfoje ŝin pririgardis.

“Ĉu vi ion legis, kuzineto?” li demandis.

“Mi lernis unu jaron kaj nun memoras nur kelkajn vortojn,” respondis Daiyu.

“Via nomo?”

Ŝi respondis. Li demandis pri ŝia ĝentilnomo.

“Mi ne havas,” ŝi respondis.

“Mi donu al vi belan ĝentilnomon,” li proponis ridetante. “Pinpin, jen la plej trafa.”

“De kie ĝi venas?” Tanchun intervenis.

“Laŭ ‘La Kompendio pri Antikvaj kaj Nunaj Homoj kaj Objektoj’, en la Okcidento ekzistas ŝtono, nomata *dai*, per kiu oni povas nigri la brovojn anstataŭ per grafito. Cetere, la brovaj pintoj de mia kuzineto kurbas milde. Ĉu ambaŭ ideogramoj ne estas trafaj?”

Tanchun hahais. “Denove via elpensajo!”

“Escepte de la Kvar Libroj, preskaŭ ĉie vidiĝas elpensajoj. Ĉu sole mi?” Kontestinte li sin returnis al Daiyu kun la demando “Ĉu vi havas jadon?”

Neniu el la ĉeestantoj kaptis la sencon. Daiyu konjektis, ke li havas jam jadon kaj tial ŝin demandas. Ŝi donis la respondon:

“Ne, mi ne havas. Tia jado, mi supozas, estas vera raraĵo. Ne ĉiu

devas havi.”

Aŭdinte tion Baoyu ekfrenezis. Li ĝin deŝiris kaj forte forĵetis, blasfemante:

“Kia raraĵo! Kio ‘animita’ ne ‘animita’! Ĝi eĉ ne povas distingi homojn bonan de malbona. Mi ne volas! For ĉi aĉaĵon!”

Ĉiuj servoknabinoj konsternite direktis sin al la jado por ĝin levi. La Avino angore prenis la nepon al sia sino.

“Pekulo!” ŝi riproĉis. “Koleru, kaj batu kaj insultu, ne gravas! Kial nepre ĵeti la vivgardan trezoron!?”

Larmoj riveris sur la vizaĝo de Baoyu.

“Neniu el miaj fratinoj havas,” li grumblis. “Kial nur mi? Ĝi neniom interesa. Hodiaŭ venis la feina kuzineto. Eĉ ŝi ne havas. Ĝi do certe ne io bona!”

La Avino penis lin kvietigi. “Ankaŭ via kuzino havis pecon. Via onklino ĉe la forpaso bedaŭris lasi ŝin sola. Kion fari? Oni do entombigis ankaŭ ŝian jadon. Per tio via kuzino plenumu la filinan amon; kaj la animo de via onklino povu ĉiam vidi la filinon. Tial Daiyu diris, ke ŝi ne havas, ĉar ŝi sin ĝenas rakonti tion. Zorge portu ĝin, kaj gardu, ke via panjo ne informiĝu pri la okazaĵo!” Ŝi prenis la jadon el la mano de servistino kaj kroĉis ĝin sur lia brusto.

Konvinkite per ŝiaj vortoj li lasis la aferon.

Nun vartistino venis demandi, kie Daiyu loĝu.

“Hodiaŭ Baoyu estu ĉe mi, en la interna ĉambro,” respondis la Avino. “Daiyu loĝu portempe en la Verdagaza Ĉambreto. Baldaŭ printempo venos, tiam ni rearanĝu!”

“Ho, mia bona avineto!” interrompis Baoyu. “Lasu min nokti ekster la Ĉambreto! Kial mi venu vin ĝeni?”

La Avino, iom pripensinte, diris: “Nu, bone!”

Ĉiu havis unu vartistinon kaj

unu servistinon. Aliaj servistinoj deĵoris nokte en la ekstera ĉambro. Kaj Xifeng jam ordonis alporti lilan kulvualon kaj kelke da broditaj litkovriloj kaj satenaj matracoj.

Kun Daiyu venis nur du — vartistino Wang kaj la 10-jara servistino Xueyan. Konsiderinte Xueyan tro juna kaj iom naiva kaj vartistino Wang tro olda en la servado al Daiyu, la Avino donis al ŝi sian duagradan servistinon, nomatan Yingge. Samkiel Yingchun kaj la ceteraj fraŭlinoj en la domo, Daiyu havis ne nur propran eksmamnutristinon, sed ankaŭ guvernistinojn, du tualetajn servistinojn kaj kvin aŭ ses servoknabinojn servantajn en ordigo de l’ ĉambro kaj aliaj hejmaj laboroj.

Vartistino Wang kaj Yingge akompanis Daiyu en la Verdagazan Ĉambreton, dum Baoyu havis akompanion de vartistino Li kaj la persona servistino nomata Xiren, ĉe la granda lito en la ekstera ĉambro.

Ankaŭ Xiren estis ĉambristino de l’ Avino. Ŝia antaŭa nomo estis Ruizhu. Pro amo al sia nepo la Avino donis ŝin, bonkoran kaj lojalan knabinon, al li, pensante, ke liaj servistinoj eble ne povas bone labori. Baoyu jam sciis, ke ŝia familia nomo estas Hua (Floro). Cetere, li rememoris la vortojn en antikva poemo — pro penetr’ de florarom’ al hom’... — li do petis permeson de l’ Avino ŝanĝi ties nomon je Xiren (penetri al homo). Tiu ĉi knabino, kiel dirite, devota tiom, ke servante al la Avino ŝi pensis ĉiam nur pri ŝi, kaj nun pri li. Tamen ŝi ofte ĉagreniĝis pro tio, ke ŝi vane deadmonas lin de ĉia ekstravagancaĵo.

Nokte, Baoyu kaj vartistino Li jam endormiĝis. Xiren rimarkis, ke Daiyu kaj Yingge babilas en la interna ĉambro. Ŝi eniris piedpinte, en negliĝo.

“Kial vi, Fraŭlina Moŝto, ankoraŭ ne dormas?” ŝi demandis ridete.

“Bonvole sidiĝu!” petis Daiyu.

Xiren eksidis sur la litrando.

“Fraŭlino Daiyu malĝojas,” diris Yingge. “Ŝi plendis kontraŭ si kun larmoj. ‘En la unua tago post mia alveno mi jam kaŭzis perturban al la juna mastro. Ĉu ne estus mia kulpo, se li rompus la jaden?’ Ŝi ĉagreniĝis tiom, ke mi apenaŭ sukcesis ŝin kvietigi.”

“Ne tiel pensu, fraŭlino!” diris Xiren. “Vi vidos eble ion pli absurdan. Vi ne havus trankvilan momenton, se vi prenis serioze lian konduton. Lasu! Lasu!”

“Mi memoru viajn vortojn,” promesis Daiyu.

Ili ankoraŭ iom babilis kaj poste disiĝis.

Matene de l’ sekva tago, salutinte la Avinon, Daiyu sin direktis al la ĉambro de Matrono Wang, kiam tiu ĉi lasta legis kun Xifeng leteron el Jinling. Daiyu vidis ankaŭ du servistinojn, kiuj alportis buŝan mesaĝon de la frato de Matrono Wang.

Daiyu ne sciis, kio okazis. Sed Tanchun kaj la aliaj divenis, ke ili diskutas pri tio, ke Xue Pan, la filo de Onklino Xue en Jinling, devas esti juĝata de tribunalo pro tio, ke li mortigis homon pretende de riĉo kaj potenco. Wang Ziteng, frato de Matrono Wang, informiĝinte pri la afero, urĝe sendis tiun mesaĝon, por venigi ĉefurben ties familianojn. ■

1. la Kvar Libroj: la kvar libroj, “Granda Lerno”, “Ora Mezo”, “Analekto de Konfuceo” kaj “Menzio”, kiujn Zhu Xi, granda konfuceanisto en la dinastio Song (960 — 1279), kompilis kaj klarigis, estis legendaraj por ŝtataj ekzamenotoj en la dinastioj Yuan, Ming kaj Qing (1206—1911).
2. Bi Gan: onklo de la reĝo Zhou de la dinastio Shang (17 jc. a.K. — 11 jc. a.K.) La historio rigardas lin kiel grandan saĝulon. Pro lia plurfoja persvado al la reĝo, la brutala reĝo ordonis elpreni lian koron.
3. Xi Shi: fama ĉina belulino en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770—221 a.K.)
4. Pinpin: en la ĉina lingvo la du ideogramoj signifas “kuntiritaj brovoj”, iom kurbaj.

POR KOMENCANTOJ

“Mi vidis nur oron.”

Estis homo oroavida. Iun tagon li iris sur la straton, rekte al la vendejo de oro. Li kaptis oron kaj forturnis sin. Policanoj arestis lin kaj demandis:

“Kial vi rabis alies oron antaŭ la publiko?”

“Mi pensas nur pri oro, mi vidis nur oron kaj neniun homon.”



“Se vi havos pli multe da mono, vi eble aĉetos kromedzinnon.”

Mevoj

Iu homo loĝanta apud maro tre ŝatis mevojn. Ĉiutage li distris sin kune kun mevoj ĉe la maro. Lin ĉiam sekvadis grupoj da mevoj.

Foje lia patro diris al li:

“Ĉu mevoj tre ŝatas vin? Kaptu por mi kelke da ili, ke mi povu distri min per ili.”

La filo konsentis kaj iris al la maro en la sekvanta tago. La mevoj flugadis en la aero kaj neniu el ili alproksimiĝis al la tero.

Malavida edzino

Geedzoj estis preĝantaj antaŭ brulantaj kandeloj kaj incenso. La edzino petis:

“Dio gardu nin, ke ni akiru centon da moneroj.”

La edzo miris:

“Kial vi petas tiom malmulte?”

Timemulo

Estis homo stulta kaj timema.

Foje li iris en la hela lunlumo. Subite li rimarkis sian ombron. Li pensis, ke ĝi estas diablo, kaj



tuj kuregis hejmen en terurego. Kiam li atingis la hejmon, li mortis de angoro. ■

Brilas antikva mono

LIULICHANG de Pekino estas strato kun apartaj gustoj. Tie la butikoj kun antikvecaj trajtoj vendas ĉinajn paperon, penikojn, tuĉojn kaj inkujojn, pentraĵojn, kaligrafiajn librojn, porcelanaĵojn kaj aliajn antikvaĵojn kaj kulturajn objektojn. Oni nomas ĝin kultura strato. La strato allogas al si multajn turistojn ĉinajn kaj alilandajn dank' al sia longa historio kaj apartaj vendaĵoj. Mi ŝatas ĝin viziti, kaj interalie Qingyuntang, kie oni vendas antikvajn monerojn, estas nepre vizitata loko por mi.

Ascendinte la duan etaĝon laŭ mallarĝa ŝtuparo, mi venis en halon kun areo de 45 kvadrataj metroj. Laŭ la muroj kaj meze de

la halo staras vitroŝrankoj kun 3 000 specoj da antikvaj moneroj kaj monpapiroj ene.

Ĉinio estas unu el la landoj, kiuj plej frue ekuzis monon. Jam antaŭ 4 000 jaroj en Ĉinio aperis mono. En vitroŝranko oni ekponas kelkajn pecojn da antikvaj konkaj, mono uzata en la lastaj jaroj de la primitiva socio kaj la komenco de la sklava socio de Ĉinio. Ĝi estas la plej frua mono uzata en la centra parto de nia lando. Apud la konkaj kuŝas diablavizaĝaj moneroj, altklasa mono el bronzo siatempe. La diablavizaĝaj moneroj montras, ke la ĉina mono jam eniris en la periodon de metalaj moneroj 400 jarojn antaŭ Kristo. Tie vidiĝas ankaŭ moneroj glavformaj,

plugil-formaj, diskformaj kun ronda truo, kiuj estis cirkulantaj en la regnoj de la periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770-221 a.K.).

Plurajn vitroŝrankojn okupas rondaj moneroj kun kvadrata truo produktitaj en malsamaj periodoj en la ĉina historio. Inter ili troviĝas "Yihua", ronda monero kun kvadrata truo, produktita de Yan-regno, "Banliang" cirkulanta en Qin-dinastio (221-207 a.K.) post ĝia unuigo de Ĉinio, "Wuzhu" de Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.). La ronda bronza monero kun kvadrata truo estas ĉefa formo de mono cirkulanta en pli ol 2 000 jaroj ekde Qin-dinastio. Tie oni ekponas ankaŭ monpaperojn de

Antikvaj moneroj en vendejo



Aĉeto de antikvaj moneroj



Ming-dinastio, valuton cirkulantan en la regionoj de nacimalplimulto, monerojn arĝentajn, memorajn kaj bonaŭgurajn kaj multajn monpaperojn cirkulantajn en la moderna Ĉinio.

S-ro He, mezaĝa administranto de la butikoj, estas numismato. Li diris, ke antaŭe en Ĉinio estis malpermesate vendi antikvajn monerojn kaj ke ĉiuj elterigitaj moneroj devis esti konservataj de la burooj de historiaj objektoj. En la pasintaj kelkdek jaroj en la tenejo de la Pekina Buroo de Historiaj Objektoj estis konservataj pli ol 50 tunoj da bronzaĵoj, kiujn neniu prizorgis kaj ordigis, kaj sekve ili fariĝis peza ŝarĝo de la buroo. Fine de 1988 ekfunkciis la butikoj de antikvaj moneroj, ĝi estas la unua butikoj sankciita de la registaro kiel speciala vendejo de antikvaj moneroj kaj iliaj imitaĵoj.

Por ke la antikvaj moneroj rebrilu, s-ro He organizis homojn por ordigi la antikvajn monerojn monte amasigitajn. Nun eksponiĝas specimenoj de pli ol 2 tunoj da antikvaj moneroj purigitaj kaj klasifikitaj en la vendejo. La butikoj multe interesas amatorojn de antikva mono. Laŭ difino de la registaro 350 specoj de antikvaj moneroj povas esti eksportataj. La butikoj vakse sigelis la moneron, kiun eksterlandaj turistoj rajtas porti al sia lando. Nun pli kaj pli da alilandanoj frekventas ĝin.

Ordigante antikvajn monerojn, la butikoj trovis multajn rarajn specojn, kiuj kompreneble ne estas vendataj. Oni kolektas ilin por eksponado. Pere de ili oni montras la evoluon de la ĉina mono. S-ro He diris al mi, ke li volas funkciigi tiun butikon kiel muzeon de antikva mono. Tio ja estas vere bona ideo. Mi sincere deziras, ke lia plano realiĝu kiel eble plej baldaŭ. ■

GIGANTA OKULO POR OBSERVI LA KOSMON

de LI QIANG


LA plej granda teleskopoj de Ĉinio estas starigita sur monto apud la vilaĝo Lianying de Xinglong-gubernio, Hebei-provinco, kie estas observejo de la Pekina Observatorio.

La konstruaĵo prezentiĝas tute aparta kaj sufiĉe granda. S-ro Ye Jitang de la observatorio diris al mi, ke tiu observejo estas konstruita speciale por teleskopoj kun diametro de 2.16 m. La malsupra parto de la observejo estas cilindra, kun diametro de 22 m kaj alto de 35 m. La supra estas ŝtala kupolo kun diametro de 22 m, kiu rotacias. Tra la lukoj de la kupolo oni observas astrojn per la teleskopoj en ĉiuj direktoj.

La teleskopoj staras meze de la kvara etaĝo de la observejo. Esploristo Jiang Shiyang konigis al mi la teleskopojn. Ĝi konsistas el partoj optika, mekanika, dinamika kaj aŭtomata, kun totala pezo de 92 tunoj. Ĝia ĉefa lenso kun pezo de 3 tunoj havas diametron de 2.16 m kaj dikon de 30 cm. La teleskopoj estas fiksita sur du sokloj kun malsamaj altecoj. La sokloj kaj la teleskopoj estas ligitaj kaj subtenataj de speciala ekipaĵo, kiu faciligas rotaciadon de la teleskopoj. Per la aŭtomata ekipaĵo la teleskopoj akurate sekvas observatajn astrojn. La teleskopoj estas provizi-

ta ankaŭ per avangarda fotilo kaj sensiva sondaparato. Vicesploristo Wang Shunde gvidis tiam grupon da specialistoj en provfarado de optikfibra spektrogramoj kaj akiris iagradan sukceson en observado. Ili fiksas multnombrajn optikajn fibrojn sur astraj objektoj per la teleskopoj por registri spektrogramojn. Per tio ili povas registri maksimume 20 spektrogramojn. Post finfarado de la spektrogramoj oni multe altigos la uzeblecon de la teleskopoj.

S-ro Jiang diris, ke la planado kaj projektado de tiu ĉi teleskopoj komenciĝis jam en 1958. En tiu tempo troviĝis tre malmulte da reflektaj teleskopoj kun diametro de 2.16 m. Sed bedaŭrinde, pro diversaj kaŭzoj ili komencis oficiale provfari tian teleskopojn en 1974. En 1986 ili konstruis observejojn en la Xinglong-a Stacio de la Pekina Observatorio. Je la fino de 1988, ili elfaris la teleskopojn kaj post unu jaro, je la fino de 1989, ili sukcesis munti ĝin. S-ro Jiang kun emocio diris al mi, ke jam pasis 30-kelkaj jaroj de post 1958. En tiu periodo la aliaj landoj progresis senescepte. Tiu ĉi teleskopoj tamen estas malpli granda ol tiu kun diametro de 2.34 m, farita de Hindio en 1985, kaj okupas la 30-an lokon en la



La observejo kun teleskopo

mondo laŭ grandeco.

Ĝenerale, teleskopo kun pli granda lenso havas pli grandan kapablon en distingado de foraj mallumaj astroj, tio estas, oni povas esplori pli vastan spacon de la kosmo. Mi informiĝis de


Observado de astro

s-ro Jiang, ke per tiu ĉi teleskopo oni povas vidi malluman stelon 25-gradan, t.e., laŭ lia komparo, la lumon de brulanta alumeto fore je 20 000 km. La esplorado de kvazaŭsteloj estas ĉefa temo traktata de la

nuna astronoma rondo. Antaŭe, ĉinaj astronomoj faros spektran observadon per malgranda teleskopo kaj post kiam ili trovis "kandidatojn" de kvazaŭsteloj, ili sin turnis al alilandaj kolegoj kun peto, ke la lastaj aranĝu por ili daton de observejo per granda teleskopo. Post la lanĉo de la teleskopo kun diametro de 2.16 m, la esplorado de kvazaŭsteloj en Ĉinio rapide progresas. Krome, ĉinaj astronomoj faras ankaŭ esplorado pri ruĝa ŝo-

viĝo (Hubble-efekto), surfaca aktivado de fiksj astroj, stela tremo k.a., kiujn oni ne povas observi per malgranda teleskopo.

S-ro Jiang informis min, ke nelonge post la lanĉo de la teleskopo la ĉinaj astronomoj sukcese faris observadon kaj esplorado. La 6-an de decembro, 1989, ili unuafoje faris observadon per la teleskopo, celante la stelon γ de Kasiopeo. Ĝi estas duagrada luma kaj varia stelo fame konata. Dum duhora observado ili fotis unu spektron en ĉiu tria minuto kaj akiris sume 40 spektrojn. Post analizo la fakuloj konstatis, ke la spektroj evidente varias, tio signifas, ke la strukturo de la stelo γ senĉese ŝanĝiĝas. Post tio, de la 7-a ĝis la 17-a de decembro, samjare, per tiu ĉi teleskopo, unu el la 23 grandaj teleskopoj en la mondo partoprenantaj en la stafeta observado de tri astraj objektoj, oni faris observadon kaj akiris kvar kasetojn da materialoj, ĉiu kun 80 spektroj. Per tio la ĉinaj astronomoj prezentis al la internacia astronoma rondo fidindajn sciencajn donitaĵojn. ■



Ĉina ŝako (VI)

de RONG HUI

TAKTIKOJ EN MEZA STADIO (1)

La ludo de ĉina ŝako havas unuan, mezan kaj finan stadiojn. El ili la meza stadio estas ŝlosila, la taktikoj en tiu stadio multe varias. Jen estas konkretaj taktikoj: Planado de kapto de ŝakpeco de la rivalo, reciproka kapto de egalaj ŝakpecoj, dispozicio de ŝakpecoj, forlaso de ŝakpeco, reteno de ŝakpecoj de la rivalo, blokado kaj pinĉa atako kaj trarompo de sieĝo ktp.




1. **Planado de kapto de ŝakpeco de la rivalo.** Estas multaj manieroj por kapti ŝakpecojn de la rivalo. Se oni sukcesas kapti ĉaron, ĉevalon aŭ kanonon de la rivalo, li faras la situacion favora al li kaj metas bazon de venko. Sed la ludanto devas atenti pri la sekvo. Se

la kapto de ŝakpeco de la rivalo rezultigos al si pasivan kaj eĉ malfavoran situacion, tio estas nefarinda. Ekz., en la bildo 1 la nigra ĉaro estas kaptanta la ruĝan kanonon sur la 2-a linio, kiu povas kapti la nigran ĉevalon sur la 5-a linio, sed la ruĝa partio ne atakas la ĉevalon, sed movas sian ĉevalon sur la 1-a linio antaŭen al la 2-a por ke la ruĝa kanono ataku la nigran ĉaron, kiu trovas nenium alian vojon krom moviĝi du paŝojn malantaŭen kaj kapti la ruĝan ĉevalon. Sekve la ruĝa partio movas la ĉaron de la 1-a linio al la 2-a kaj kaptis la nigran ĉaron, per tio ĝi gajnis la superecon.

2. **Reciproka kapto de egalaj ŝakpecoj.** Per tio oni celas akiri superecon, savi sin el krizo, simpligi kaj stabiligi la situacion. Ekz., en la bildo 2 la nigra partio

kvazaŭ posedas superecon, ĝia soldato sur la 7-a linio jam transpasis la riveron, ĝiaj du ĉevaloj okupas favoran lokon, la ĉaro sur la 1-a linio ĉiam povas eliri kaj ĝia meza parto estas solide defendata. Sed la ruĝa partio faris lertan manovron kaj movas la ĉevalon de la 6-a linio antaŭen al la 8-a por minaci la nigran ĉevalon, kiu devigite kaptis la ruĝan ĉevalon. Kaptinte la nigran ĉevalon per ruĝa ĉaro, la ruĝa partio povas kapti la nigran kanonon, movante sian soldaton sur la 9-a linio antaŭen. La situacio fariĝis favora al la ruĝa partio.

3. **Dispozicio de ŝakpecoj.** Per tio oni celas movi ŝakpecojn al strategiaj punktoj por minaci la rivalon kaj formi sian superecon. Ekz., en la bildo 3 la ruĝa ĉaro jam bridis la nigran ĉevalon, sed la nigra ĉevalo estas gardata de la kanono sur la 3-a linio, la ruĝa ĉaro ne kuraĝas kapti ĝin. Se la ruĝa kanono sur la 8-a linio iras al la 3-a por kapti la nigran ĉevalon. Tiam la nigra ĉevalo devas moviĝi de la 7-a linio malantaŭen al la 9-a. Forpelinte la nigran ĉevalon, la ruĝa partio povas fari atakon en la meza parto. ■



Unua konkurseto post legado de EPĈ

1. Maniero:

Tiu ĉi konkurseto enhavas 10 demandojn. Oni trovos ĝustajn respondojn en la numeroj 1-5, 1990 de EPĈ. Bonvole elektu ĝus-

tan el la tri prezentitaj respondoj sub ĉiu demando, skribu ĝian ordan signon (A, B aŭ C) en la vakan lokon de la responda tabelo, gluu la slipon sur la kovertan dorson kaj nian adresan slipon sur la kovertan fronton, skribu viajn nomon kaj adreson, af-ranku necesajn pm. kaj sendu la

leteron al ni antaŭ la 15-a de julio 1990 (laŭ la poŝta stampo sur via letero). Ni anoncos la ĝustajn respondojn kaj la nomojn de premiitoj en la 11-a numero de EPĈ.

2. Premioj:

Tiuj, kiuj sendos al ni la respondojn antaŭ la difinita templimo, ricevos memorkoverton (kun

memor-pm.) pri la 40-jariĝo de EPĈ.

Tiuj, kiuj faros ĝustajn respondojn al ĉiuj dek demandoj, ricevos memorinsignan trion por la 40-jariĝo de EPĈ.

Ni donos 10 feliĉajn premiojn al tiuj, kiujn oni lote elektos el la legantoj farintaj ĝustajn respondojn al ĉiuj dek demandoj. La premio estos brodita Tuĝja-nacieca sako speciale farita por la 40-jariĝo de EPĈ.

Ni donos unu specialan premion — broditan Tuĝja-naciecan sakon, al tiu, kiu la unua sendos al ni la ĝustajn respondojn (laŭ la poŝta stampo). Se aperos pluraj kandidatoj, ni faros lotan elekton.

Demandaro por la unua konkurseto post legado de EPĈ

1. La plej norda vilaĝo de Ĉinio troviĝas en...

A. *Mohe de Heilongjiang-provinco* B. *Heihe de Heilongjiang-provinco* C. *Manzhouli de la Aŭtonoma Regiono de la Interna Mongolio*

2. ... estas plastike kurioza blanka pagodo kun ovala formo, supre granda kaj malsupre malgranda.

A. *La Blanka Pagodo en Beihai-parko de Pekino* B. *La Blanka Pagodo en Miaoying-templo de Pekino* C. *La Blanka Pagodo de Dayao de Yunnan-provinco*

3. ... estas la unua virino atinginta la antarktan montpinton Vinson.

A. *Ĉinino*; B. *Anglino*; C. *Ĉilianino*

4. ... estas la lasta imperiestro de la ĉina feŭda socio.

A. *Guangxu (Gŭangŝju)* B. *Puyi* C. *Pujie (Puĝje)*

5. La fervojo en la plej alta regiono de Ĉinio estas...

A. *Chengdu-Kunming-a Fervojo* B. *Qinghai-Tibeta Fervojo* C. *Guiyang-Kunming-a Fervojo*

6. La 11-a Azia Sportkunveno datiĝos de...

A. *La 22-a de junio, 1990* B. *La 7-a de oktobro, 1990* C. *La 22-a de septembro, 1990*

7. La plej granda petrol-kemiindustria entrepreno de Ĉinio estas...

A. *La Yanshan-a Petrol-kemiindustria Kompanio* B. *La Daqing-a Petrol-kemiindustria Kompanio* C. *La Zhongyuan-a Petrol-kemiindustria Kompanio*

8. ...estis la aŭtoro de la fame konata historia dramo de Ĉinio "Persikflora Ventumilo".

A. *Pu Songling de Qing-dinastio* B. *Tang Xianzu (Tang Ŝjanzu) de Ming-dinastio* C. *Kong Shangren (Kong Ŝangjen) de Qing-dinastio*

9. En majo de 1990 estis... datreveno de la fondiĝo de EPĈ.

A. *30-a* B. *40-a* C. *35-a*

10. Yixing (Jiŝing), la urbo de fajencaĵoj de Ĉinio troviĝas en la provinco... de suda Ĉinio.

A. *Zhejiang (Ĝeĝjang)* B. *Jiangxi (Ĝjangŝi)* C. *Jiangsu (Ĝjangsu)*

Bonvolu plenigi la tabelon per ordaj signoj (A, B aŭ C) de viaj respondoj, detondi ĝin laŭ la punktaj linioj kaj glui ĝin sur la kovertan dorson de via letero. (*La tabelo troviĝas en la enketa folio en tiu ĉi numero.*)

Por Dek Mil Membroj de UEA en 1992

En la lasta trimestro UEA komencis novan membrokampanjon kun la celo havi dek mil membrojn en 1992. Tio signifas gajni plian milon en ĉiu el la jaroj 1990-1992. Se la celo estos atingita, UEA fariĝos pli reprezenta kaj pli forta ol iam ajn antaŭe, sekve tio plifortigos kaj plivigligos la movadon en monda skalo. Do, la kampanjo de UEA estas aprobinda kaj subteninda.

Ĉu la kampanjo sukcesos? Tio dependas ne nur de la strebado de la estraro, komitato kaj Centra Oficejo de UEA, sed ankaŭ de la kunlaboro de la esperantistoj tra la mondo.

Kiamaniere subteni la kampanjon? Estas diversaj manieroj, ekzemple, aliĝi al kaj varbi membrojn por UEA, proponi al viaj amikoj kaj kolegoj fari tion, membrigi viajn ami-

kojn en alia lando aŭ en lando nepagipova, donaci monon al Fondaĵo Canuto ktp. Se vi havas aliajn bonajn ideojn, skribu al CO de UEA.

Nun haveblas ĉe CO la nova varbilo DUE kaj la poŝtkartformata aliĝilo, kiuj prezentas la servojn kaj agadon de UEA.

(DAI SONG'EN)



Novgeedzoj

Kirgizoj

Fotoj de DI XIANGHUA

La kirgiza nacieco estas unu el la maljunaj nomadaj naciecoj en norda Ĉinio. Pri ĝi rakontas libro verkita jam antaŭ 2 000 jaroj. La naciecon konsistigas pli ol 110 000 homoj. Ili plejparte vivas en la sudokcidenta Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj okupas sin ĉefe pri brutobredado. Ili, serenaj kaj viglaj, emas kanti kaj danci. Ili havas sian propran lingvon kaj konservas nomadisman.

Stepo ĉe neĝa monto


Ŝafokapta konkurso ŝatata de kirgizaj junuloj





Nupta dancado

Foiro



● Laŭ antaŭkalkulo de la Ŝtata Informejo, en la jaro 2000 Ĉinio plenumos jenajn normojn de la nacia ekonomio: 500 miliardoj da kg. da greno, 1 200 miliardoj da kWh da elektro, 80 milionoj da tunoj da ŝtalo, 30-33 procentoj da akumulo, la financa enspezo konsistigos 28 procentojn de la nacia enspezo kaj la ekonomia profito atingos la nivelon de la evoluintaj landoj en la 80-aj jaroj.

● Antaŭ nelonge artikolo de la ĵurnalo *Renmin Ribao* asertas, ke la individuaj kaj privataj entreprenantoj povas trankvile disvolvi siajn aferojn. La artikolo diras, ke malalta estas la nivelo de la nuna ĉina ekonomio, serioze mankas al ĝi kapitalo, granda estas la nombro de senlaboruloj en la urboj kaj la kamparo, tial disvolvi individuajn kaj privatajn ekonomiojn, kadre de la politikoj, ludas nemalhaveblan rolon por akceli produktadon de la socio, faciligi la vivon de la popolo kaj doni pli da laboroj.

● En Ĉinio nun estas 50.36 milionoj da oficistinoj kaj laboristinoj, 75-oble pli multe ol en 1949, kiam fondiĝis la nova Ĉinio.

● Per genoingenierio la Ŝanhaja Ĉelobiologia Instituto sukcesis elfari kreskigan hormonon de tria generacio. Ĝi bone efikas sur altiĝon de homa kresko. 20 infanoj kreskis meznombro unu centimetron ĉiumonate dum unujara eksperimentado. La disvastigo de la kreskiga hormono portos novan re-



La ekspedicianoj atingis la cellokon.

volucion por la brutobredado en la 21-a jarcento.

● Post sesjara klopodado la "Agrikultura Projekto de Heilongjiang", unu el la agrikulturaj planoj entreprenataj per pruntedono de la Monda Banko, estis plenumita. La projekto uzis sume 70 milionojn da usonaj dolaroj pruntedonitajn de la banko kaj 0.26 miliardon da juanoj. Laŭ la plano oni ekspluatis 200 000 hektarojn da virga tero kaj produktis en la ses jaroj 1.069 milionojn da tunoj da greno. La plenumiĝo de la projekto akcelis la agrikulturan modernigon de Heilongjiang.

● Post trijara sinteza esplorado la Ekspedicio de Nansha-insularo sub la Ĉina Akademio de Sciencoj konstatis, ke ĉe Nansha-insularo vivas abundaj fiŝoj, konkuloj kaj holoturioj. 25-100 km. sudokci-

dente de la insularo oni povas kapti maksimume 300-000 tunojn da tiuj marestaĵoj.

● 6 ekspedicianoj el Ĉinio, Usono, Francio, Sovetunio, Britio kaj Japanio atingis en la 2-a de marto la cellokon Paco-stacio de Sovetunio, trairinte Antarkton. Tio

estas alia granda venko de la homaro super la naturo en la kuranta jarcento.

● Lastatempe la ĉina registaro asignis 300 000 juanojn por konstrui longan digon kun la celo protekti la tombojn de la tibetaj reĝoj. La tomboj de la tibetaj reĝoj en la 7-9-aj jarcentoj estis masonitaj el ŝtonoj kaj tero sur alta teraso.

● En la 40-a Internacia Filma Festivalo de Okcidenta Berlino, la ĉina rakonta filmo "Jaro de Malbona Fortuno" reĝisorita de Xie Fei gajnis la premion de arĝenta urso. La filmo prezentas junulon Li Huiquan, kiu liberiĝis el karcero kaj komencis novan vivon per sia laboro. Pere de la afliktiĝo de la heroo en la adoleskanteco kaj lia enuiĝo pro la socio, la filmo spegulas la vivon de iuj junuloj de moderna urbo, la solecon, ĉagrenon, senpaciencon kaj memsavon de la nuntempaj homoj kaj analizas la komplikajn kaj subtilajn spiritan mondon de la homoj en la tajdo de reformo.

● Apud la pitoreska Okcidenta Lago de Hangzhou aperis metiejo de sud-ĉiniaj popolaj artaĵoj, en kiu estas farataj tradiciaj metiartaĵoj de la provinco Zhejiang. En la metiejo oni povas vidi la faradon de lignaj gravuraĵoj de Dongyang, buksaj gravuraĵoj de Wenzhou, ŝtonaj gravuraĵoj de Qingtian, ko-

La Sanjiang-a Olea Fabriko, unu el la agrikulturaj projektoj de Heilongjiang



loraj argilaj homfiguroj de la provinco, bambuaj plektaĵoj de Shengxian, gravuritaj inkfrotujoj de Chun'an, pasamentoj de Xiaoshan kaj manfaritaj plektaĵoj el pura silko de Yueqing.

● Ginko, rigardata kiel "nacia trezoro" de Ĉinio, estis multe produktita en la reprodukta bazo de Hunan-provinco. En 1989 oni kolektis dudek mil ginkosemojn kun totala pezo de 2 270 gramoj, 1.2-oble pli multe ol tiu kolektita en la antaŭaj 8 jaroj.

● Antaŭ nelonge oni trovis giganton en la provinco Gansu de Ĉinio. Li nomiĝas Tang Guocheng, kun alto de 2.33 metroj kaj pezo de 111 kilogramoj. Ĉiutage li bezonas 2 kilogramojn da mantoo (ĉina vaporumita farunaĵo fermentinta). Li havas normalan intelekton.

● Freŝaj floroj retrovis saton de la ĉinaj konsumantoj kaj lokon en ordinaraj familioj. Oni raportas, ke ĉiujare Ŝanhajo sola bezonas 20 milionojn da freŝaj floroj. Sekve de tio, reviviĝis kaj progresas florkulturado.

● Lastatempe la pekina diocezo de katolikismo incisis 7 monaĥinojn. La plej aĝa el ili estas 28-jara kaj la plej juna — 23-jara. En blanka robo kaj kun girlando sur la kapo, la incitoj votis virgecon, malluksemon kaj obeemon.

● Nekalusigo estas serioza komplikajo post ostarompo. Statistikoj raportis, ke ĉiujare miliono da malsanuloj en la mondo suferas de nekalusigo. Antaŭ nelonge, la hospitalo Shangxinhe de Nankino elfaris en kombino de la ĉina kaj okcidenta medicinoj la plastron Chenggugao kaj la dekoktaĵon Shenggutang, kiuj kuracas lantan kalusigon kaj nekalusigon. Dank' al apliko de tiuj medikamentoj, pacientoj povas resaniĝi sen operacio, ostogrefto aŭ amputo.

● Antaŭ nelonge eldoniĝis la "Enciklopedio de Esoteraj Preskriboj de la Ĉina Medicino" kompilita de ĉ. cent specialistoj, profesoroj kaj kuracistoj de Ŝanhajo. La enciklopedio konsistas el la volumoj de internaj malsanoj, kirurgio, ostodifektiĝo, ginekologio kaj obstetriko, pediatrio kaj kancerologio. La tuta libro enhavas pli ol 5 000 preskribojn kun 2 milionoj da ideogramoj, kaj ĉiu preskribo entenas 6 erojn pri funkcio, ingredienco, efiko k.a.

● Ĝis la fino de 1989, Ĉinio ĝemeligis siajn urbojn kun 240 urboj kaj 104 provincoj aŭ distriktoj de 40 landoj.

● Nun Ĉinio bredas 330 milionojn da porkoj, 170 milionojn da ŝafoj, 110 milionojn da grandaj brutoj kaj 2 miliardojn da korto-



Sceno el la komedio "Por ĉiu saĝulo sufiĉe simple"

birdoj. La totala kvanto okupas la unuan lokon en la mondo.

● La plej longa surtera fotofibra kablo de la mondo estis kompletigita laŭ Yangzi-rivero kaj parto de la kablo — lanĉita. La kablo longas 2 200 kilometrojn kaj havas 12 fotofibrajn kernojn, kiuj povas komuniki interparolojn de 11 520 paroj da homoj.

● La fama komedio de la rusa dramisto A. N. Ostrovskij "Por ĉiu saĝulo sufiĉe simple" estis ree surscenigita de la Pekina Popola Arta Teatro en Pekino. Pere de tiu teatraĵo spektatoroj povas plene ĝui la stilon de la rusa komedio kaj la artan ĉarmon de la realisma dramo.

Kondolenco

Tute neatendite, ni informiĝis kun granda malĝojo pri la forpaso de s-anino Akiko Ŭusink-Nagata je la 13-a de januaro 1990.

Kiel nia fidela amikino de longaj jaroj, s-anino Akiko Ŭusink-Nagata ĝuis nian estimon kaj dankemon pro sia sindonema agado kaj elstara kontribuo por Esperanto kaj Esperanto-movado kaj sincera amikeco al la ĉinaj esperantistoj. Ŝia forpaso estas granda perdo por nia movado kaj ankaŭ por ni ĉiuj.

Al la familianoj de s-anino Akiko Ŭusink-Nagata ni esprimas nian koran kondolencan.



Ĉina Esperanto-Ligo
Redakcio de EPC



Amatoro de
miniaturaj
envazaj
pejzaĝoj

Teksto kaj fotoj de
LIU SIGONG

Gu Jingwen en flegado






La nomitaj pejzaĝoj, faritaj el vegetaĵoj kaj rokaĵo, estas artaĵo laŭdata kiel “elvokiva poemo kaj tridimensia bildo”. Per delikata prilaborado aŭ zorgema kultivado oni prezentas naturajn pejzaĝojn en malgrandaj vazoj.

La arto havas longan historion kaj elbakis multajn fakulojn kaj amatorojn. Antaŭ 20 jaroj en la urbo Suzhou ŝoforo Gu Jingwen komencis krei miniaturajn envazajn pejzaĝojn en postlaboraj horoj. Li sukcesis fari multajn tiajn

pejzaĝojn. Iuj, kun fortikaj radikoj kaj branĉoj, aspektas kiel antikvaj arboj, kaj aliaj, kun abundo da ĉarmaj floroj kaj fruktoj, aspektas kiel bunta brokato. Ili estas admirataj de fakuloj kaj rigardantoj.



“Damo Papilio” de Taiwan en Pekino

de WEI RAN

EN januaro, fraŭlino Lü Lili, fama soprano de Taiwan, prezentis la operon “Damo Papilio” en la teatro Tianqiao de Pekino, kunludante kun la aktoroj de la Centra Operejo de Ĉinio. Ŝian prezentadon la pekinaj ŝatantoj ĝuis kun granda plezuro.

“Damo Papilio” estas tragedio verkita de itala komponisto G. Puccini, kun orienta virino kiel heroo. La tragedio okazis sur iu monteto en la havenurbo Nagasako, dum la restaŭrado de Meizi-tennoo de Japanio. La tragedio prezentis malfeliĉon de la amo de japana gejšo.

Sed la premiero de la opero en 1904 malsukcesis en Milano. Tamen tio ne deprimis G. Puccini. Li reviziis la komponaĵojn kaj fine sukcesigis la prezenton. La opero prezentigis pli ol mil fojojn en la mondo. La reĝisoroj de diversaj lokoj faris malsamajn traktadojn pri la roloj, intrigoj kaj sceneja dekoracio; iuj sukcesis, dum aliaj malsukcesis. Ĉi-foje

du famaj ĉinaj reĝisorinoj Han Bing kaj Chen Dalin direktis la provadon de la orientalisma opero ludata de aktoroj de Taiwan kaj la ĉeftero de Ĉinio. Ilia reĝisorado akcentis subtilecon kaj atikecon de la scenejaj gestoj kaj atmosfero, kio enkorpegis la tradicion de orientanoj.

La rolulino de Ciocio-San (Damo Papilio), fraŭlino Lü Lili, genia soprano diplomita el la itala Konservatorio Verdi, akiris sume dek premiojn en Taiwan kaj estis plurfoje premiita ankaŭ en Grekio, Italio kaj Usono.

Fraŭlino Lü Lili estis alte takсата de operaj kompetentuloj de Pekino. Per multaj nuancoj de la voĉo ŝi ĝustasence esprimis la malsamajn humorojn de Ciocio-San en la transiro de fraŭlino al sinjorino. Fakuloj diris, ke fraŭlino Lü Lili estas “kantistino plej taŭga por ludi rolon en tragedio”.

La rolo de usona subleŭtenanto Pinkerton estis ludata de juna tenoro Lin Jinyuan de la Centra Operejo de Ĉinio. Li ludis

ĉefrolon de “Carmen” kaj la opero estis surdiskigita, kaj la disko akiris la grandan premion de Charles Cros por la Internacia Disko de la 20-a Jarcento en 1983.

La orkestron direktis fama direktisto Yao Di el Hongkongo. Li estis unu el la ĉefaj iniciatintoj de la prezentado. Lia direktado karakteriziĝas per klareco kaj sukcesa enkorpego de mildeco kaj entuziasmo en la komponaĵojn.

La Centra Operejo de Ĉinio komencis ludi mondfamajn operojn en 1956. La unua opero de ĝi prezentita estis “La Traviata”, poste “Damo Papilio” kaj “Eugene Onegin”.

En la lastaj jaroj, dank’ al la pordmalferma politiko, la Centra Operejo de Ĉinio prezentis pli kaj pli multe da fremdlandaj operoj. Samtempe kun tio, la Centra Operejo de Ĉinio vaste kontaktigis kun fremdlandaj artistoj, ekzemple kun japanaj artistoj la operejo ludis “Gruo de Vespero”, kun francaj artistoj “Carmen”, kun italaj artistoj “La Pajaco” kaj “Gianni Schicchi”, kun usonaj artistoj “Ofertisto de Muzikiloj” kaj “La Fantazioj”. Dum provado por “La Nupto de Figaro” la ĉinaj aktoroj akiris helpon de brita artisto.

Tamen estis la unua fojo, ke la plej supera kantistino de Taiwan kaj elstaraj artistoj de la ĉeftero de Ĉinio kunludis operon en la pasintaj 40 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio. ■

Yao Di direktas provludon. Foto de ZHOU HUAYIN





Ciocio-San kaj ŝiaj amikinoj

Foto de HAN HONG

En la nupto de Ciocio-San kaj Pinkerton


Foto de PI DAWEI





Geamantoj Ciocio-San kaj Pinkerton

Foto de HAN HONG





Ciocio-San sin mortigis pro tio, ke Pinkerton kun sia usona edzino forportos la filon.

Foto de **ZHOU HUAYIN**

Ciocio-San kaj ŝia filo
Foto de **ZHOU HUAYIN**



Ciocio-San ĝojas pro sia
revenonta edzo.
Foto de **ZHOU HUAYIN**



Smolando de Svedio en vintro kaj somero

de Malte Markheden (Svedio)

